

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

L. L. Zamenhof:

NAŠE CESTA

*Hle, meta, k niĝ spějeme, odvahou hñáni,
ta v hluboké temnotě svítí,
jak na nebes báni když hvězdičky pláni
nám zvěstuje, kudy jest ĵítí.
Ne, přizraky noční nám nezmatou hlavu,
ni osudu rány, ni posměšky davu,
neb kráčime po cestě jasné a přímé
a neklamně — dobře to víme!*

*Toĝ nebočme s cesty a směrujme k cíli
jen rovně a s odvahou stálou,
vždyť kapka, když dopadá chvíli co chvíli,
i ŝulovou pronikne skálou.
Kdo doufá, má strpeni, na svém vždy stojí,
ten povlovně při této zásadě troji,
byť musil i dlouho své napinat síly,
přec ve slávě dospěje k cíli.*

*My sejem a neznáme únavy žádně,
jen v budoucnost hledice dále.
Sto semen, snad tisíc ĵich na skálu padne, —
leč sejem a sejeme stále.
„Ĵiĝ dosti!“ tak výsměch nás odevšad studí, —
„Jen dál a jen dále!“ tak zní nám to v hrudi:
„Jen vpřed, ať ti ŝehnají vnukové tvoji,
ĝes úsilně vytrval v boji!“*

*Kdyĝ udeři sucho a větry když vanou
a povadlé servou nám listí,
tu vděčni jsme za svěŝi sílu nám danou,
neb cítíme, jak jsme zas čistí.
Nic nezdolá udatnou družinu naši,
ni vichry, ni stání ĵi nepozastraší,
ta muĝně a pruĝně a s nadšením v tváři
ĵde za cílem, před ni jenĝ záři.*

*Toĝ nebočme s cesty a směrujme k cíli
jen rovně a s odvahou stálou,
vždyť kapka, když dopadá chvíli co chvíli,
i ŝulovou pronikne skálou.
Kdo doufá, má strpeni, na svém vždy stojí,
ten povlovně při této zásadě troji,
byť musil i dlouho své napinat síly,
přec ve slávě dospěje k cíli!*

Z esperanta přeložil Miloš Lukáš.

Jan Masaryk k esperantistům v dopravě (v říjnu 1947):

Slyšel jsem o tom, jak se zaměstnanci v dopravě zajímají o esperanto. Doprava nejen zmenšila svět, ale umožnila, že spojení, které udržuje, přibližuje lidi různých národů. Teď jde ještě o to, aby si všichni rozuměli. Společná řeč, nebo také jednota myšlení, je, jak to vidíme, dosud hlavní nedostatek. Každý z nás musí udělat něco, abychom se dostali na společnou kolej.

Rozhodli jste se, že Vaším příspěvkem je šíření znalostí esperanta, vítám tuto Vaši snahu a přeji Vám hodně zdaru.

Jan Masaryk v. r.

ŘÁDNÝ SJEZD

Svazu esperantistů Československé republiky
koná se v Praze dne 17. a 18. dubna 1948.

Všimněte si podrobného programu v č. 2., str. 13.

Změna! Sobotní přátelská beseda, v níž diskusi zahájí Dr. Stan. Kamarýt přednáškou: Aktualaj problemoj, koná se nikoli v Louvru, nýbrž v místnostech Aero klubu, Praha II, Smečky 22. - Zábav. vložky: Mládež EK. Praha.

Nedělní sjezdové jednání je v Louvru, jak oznámeno. Čekáme hojnou účast!

Raporto pri agado de la Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko dum 1947

(Por regula kongreso en Praha la 18-an de aprilo 1948.)

Ni prezentas raporton pri agado Asocia kaj petas niajn membrojn legi ĝin atente. Ili vidos kiom diversfaka kaj ampleksa estas nia laboro. Kaj ni esperas, ke ni trovos plurajn aktivajn kunlaborantojn. Ni estas kontentaj kun la resonado, kiun havas nia laborado, kiel ĝi esprimiĝas per kresko de nia membraro. Malpli kontentaj ni estas kun kresko de nombro de aktivuloj, kiuj transprenus partojn de taskoj. Ni esperas, ke legado de tiuj ĉi raportoj instigos vin plurajn por ekiri kun ni sur nia vojo: akiri novajn aktivajn adeptojn de lingvo internacia, konvinkante po individuoj kaj preparante nin al agado amasa. La raporto estas verkita de vicprezidanto Dr. Stan. Kamarýt laŭ partaj raportoj, kiujn li ricevis de diversaj funkciuloj. Ĝi estas konciza. Ni povis ofte citi tion, kio jam estas ĉe ni presita. La paĝoj koncernas jarkolekton 1947, se estas nenio alia dirita.

1. Konsisto de la komitato. La komitato, elirinta el elektoj de la kongreso, dividis inter si la funkciojn kaj starigis komisionojn en sia unua kunveno la 1-an de aprilo 1947. La listo aperis sur paĝo 48. Ĝi restis sen ŝanĝo dum la tuta jaro. Daŭris iom da tempo, ol la laboroj ekfunkciis kontentige. Pri tio oni povas paroli nur deponit septembro, kiam denove estis koncentrigitaj ĉiuj asociaj sendaĵoj al adreso de s-o Fr. Slavik kaj kiam librotenisto Jiří Hromada transprenis, kiam li estis farinta ordon en la kalkuloj, ankaŭ ekspedado de la libroservo, kaj s-o Ota Ginz gvidon de la Libroservo. Depost tiam funkciis kontakto inter la komitatanoj kaj niaj membroj kontentige kaj ni plurfoje aŭdis kaj legis dankajn konstatojn. En januaro 1948 rezignis pri sia funkcio pro troa profesia okupiteco ĝenerala sekretario Boh. Paleček.

2. Komitatataj kunvenoj okazis 1. IV., 16. IV., 16. V., 2. IX., 16. IX., poste ĉiun unuan mardon, kaj 17. II. Ĉiuj estis prezidataj de Ad. Malik escepte tiujn la 4-an de novembro kaj 17-an de februaro, prezidatajn de Rudolf Hromada. Protokolis en preskaŭ ĉiuj Jar. Mařík. Depost la 2. IX. estis pri ĉiuj kunvenoj sendata al komitatanoj multobligita detala protokolo, plej ofte verkita kaj multobligita de Jar. Mařík. Tio tre helpis al kontakto de komitatanoj kaj komisionestroj kaj ilia kunlaboro estis ĝenerale kontentiga. Venadis al ĉiuj kunvenoj leteroj de neĉeestantaj anoj kun proponoj, instigoj, kritikoj. Pro troa okupo alifaka de Mařík tiuj protokoloj ne estis dissenditaj lastatempe, sed estas intenco daŭrigi tiun tre utilan manieron de kontakto inter la komitatanoj, regionaj perantoj kaj la kluboj.

3. Regionaj kunvenoj okazis en Hradec Králové (18. III.), Brno (8. VI.), Pardubice (22. VI.), Olomouc (14. XII.). En ĉiuj partoprenis niaj delegitoj kaj estis pri ili raportite en nia organo. Ili estis laborkonferencoj, kunvokitaj de regionaj perantoj.

4. Administrado. Ni provis post la tiujara kongreso starigi plurajn adresojn por decentrigi nian ampleksan agadon. Sed tio montrigis supozon falsa. Leteroj, adresataj al Praha XII, Stalinova 12, ne atingis plurfoje koncernajn funkciulojn. Tial ni revenis al la elproviĝinta kutimo kaj denove koncentrigis ĉiujn korespondadojn al Praha XIX, Uralské nám 9, kie loĝas oferema samideano Fr. Slavik, kiu akceptas la korespondadojn, diversajn mem prilaboradas kaj ceterajn kondonas al koncernaj funkciuloj. Li ankaŭ akceptas korespondadojn pri la gazeto kaj prilaboras tiujn pri administrado. Pro tio li akceptu la plej varman dankon de ni ĉiuj. En fino de somero transprenis s-o Jiří Hromada ekspedado de libroj kaj en komenco de aŭtuno administradon de membroj krom sia funkcio de librotenanto asocia. Tio enigis deziratan ordon en nian administradon. Sed ĝi kaŭzis troan streĉon de ne tro multaj unuopuloj laborantaj, kaj loĝejo de Hromada fariĝis ne sole kvazaŭ oficejo asocia sed eĉ depono de nia librostoko. En fino de la jaro akceptis s-ino Eliášová por neĝranda rekompenco skribi leterojn, diktitajn de kelkaj funkciuloj, precipe de Rudolf Hromada kaj O. Ginz. Tio iom helpis la aferojn, sed daŭre ne estas elfenebla. Tial ni kun granda ĝojo akceptis en februara komitata kunsido larĝan proponon de samideano Balda lui de li butikon en Praha II, Malá Štěpánská ul. 7, kiu estos

adaptita kiel Asocia oficejo. Li akceptis funkciojn de Asocia oficisto, 4 horojn potage por responda salajro. La ejo estos je nia dispono en fino de aprilo. Estos tien transportitaj nia stoko de libroj kaj aliaj objektoj. Ni serĉas taŭgajn meblojn por ekipi tiun ejon. Ni tre ĝojas pro tiu ĉi nova aranĝo kaj tre dankas al samideano Balda pro lia decido. Ni esperas, ke enspezoj el bone instalita librovendejo helpos al ni kovri la elspezojn, kiuj ne estos malgrandaj.

5. Regionaj perantoj. Tiu ĉi funkcio, kiun ni starigis en julio 1946, jam disvolviĝis kaj enradikiĝas. La regionaj perantoj devas iniciati starigon de perantoj distriktaj kaj tiuj perantojn lokajn. Ĉiu peranto devas klopodi, ke en lia loko baldaŭ ekzistu bone funkcia loka grupo. Tio efektive okazas. Estas fenomeno natura, ke disvolviĝado de perantoj-reto ne fariĝas sen iom da miskompreno. Du regionaj perantoj (Pardubice kaj Havl. Brod) demetis siajn funkciojn. Ni ripetas nunan staton de regionaj perantoj:

- I. Praha: Jar. Šustr (I, Benediktská 11).
- II. Kladno: B. Vlčková (Dubí, Stránská 110).
- III. Mladá Boleslav: Karel Šolc (Železná 4-1).
- IV. Praha-ekstera: Vuk Echtner (Nusle II, Na Veselí n-ro 738).
- V. Plzeň: Fr. Kaván (II, Alšova 2).
- VI. Karl. Vary—Cheb: Fr. Patera (Cheb, Britská 42).
- VII. Ústí n. L.: Jar. Dušek (Střekov III, Tř. odboje 256).
- VIII. Liberec: Teo Novotný (Pražská 3).
- XI. Hradec Král.: Fr. Pytloun (II, Zamenhofova 1010).
- X. Pardubice (vakas).
- XI. Havlíčkův Brod: (vakas).
- XII. Tábor: (vakas).
- XIII. České Budějovice: Jos. Ploss (Skuherského 63).
- XIV. Jihlava: (vakas).
- XV. Brno: Josef Friedrich (Hoblikova 8).
- XVI. Olomouc: Vlast. Blažek (Dvořákova 36).
- XVII. Zlín: Fr. Bláha (Potoky 2450).
- XVIII. Ostrava: Vlad. Slaný (IX, Kutuzovova 29).
- XIX. Opava: (vakas).

Kiam institucio de perantoj plene disvolviĝos, ili devos transpreni memstaran gvidon de propagando en iliaj regionoj. Hodiaŭ ni petas precipe, ke trovi sin homoj, kiuj akceptus funkciojn en vakantaj lokoj.

La diversaj miskomprenoj, dirataj en la laborkonferenco en Pardubice, estis klarigataj en la Laborkunveno en Praha la 30. XI., pri kiu estis raportite sur paĝoj 6 kaj 18 de tiu ĉi jarkolekto. Preparis tiun kunvenon kaj raportis en ĝi vicprezidanto R. Hromada. La perantoj kontaktas kun ni koresponde kaj ni uzis iliajn sciigojn por Kroniko enlanda aŭ por Lokaj informoj.

En Slovakujo organizas tiun laboron memstare Slovaka Esperantista Societo.

6. Lokaj grupoj korporacie aliĝintaj ekzistas en Bojkovice, Brno, Břeclav, Česká Lípa, České Budějovice, Darkov, Doksy, Dolní Bousov, Hluk, Holešov, Hradec Králové, Cheb, Chomutov, Jaroměř, Josefov, Karlovy Vary, Karvinná, Kolín, Liberec, Mladá Boleslav, Mnichovo Hradiště, Nový Bohumín, Olomouc, Ostrava (3), Pacov, Pardubice, Plzeň, Podmokly, Praha, Přerov, Příbor, Prostějov, Radvanice, Sokolov, Tábor, Tanvald, Teplice-Šanov, Třebíč, Turnov, Uherské Hradiště, Ústí n. L., Vodňany, Zlín, Havlíčkův Brod, Kladno, Jablonec n. N.

Kelkaj el ili vidigas tre vigan vivon, kelkaj ĵus fonditaj preparas sin por impeta laboro. Nia plej granda grupo E. K. en Praha solenis 40 jarojn de sia ekzistado, Klubo en Brno ĉiam tre sukcese reprezentas nian movadon en Moravia ĉefurbo, Hradec Králové eldonis E. poŝkalendaron, kluboj en Hradec Králové kaj Olomouc aperigas apartan bultenon por siaj membroj. La klubo en Hradec Králové kolektis kaj organizis imponan nombron de „amikoj de Esperanto“. La Klubo en Praha estas ĉefa liveranto de la Asociaj laborantoj. La Klubo en Liberec havas regulan semajnan rubrikon en Stráž severu.

Ne de ĉiuj lokaj grupoj ni ricevis regulajn listojn de membroj kaj kalkulojn pri kotizoj. Estos tasko dum la nova jaro enigi ordon ankaŭ en tiun ĉi fakon.

7. Administrado de la membroj estis prizorgata de s-o Jiří Hromada kaj de Frant. Slavík, kiu prizorgas adresaron de ricevantoj de nia organo. — La membrokartojn dissendas s-ino Nováková.

8. Publikiga agado. De nia organo „Esperantista“, redaktata de Dr. St. Kamarýt, administrata de Fr. Slavík, ni eldonis 10 numerojn en suma amplekso da 124 paĝoj, do 4 paĝoj pli ol ni promesas kiel maksimumon. Pro ŝanĝo de la presejo eliris unua numero de la dua jarkolekto nur en komenco de la marto. Tamen ni sukcesis reguligi la aperadon kaj ni aperadis kontentige regule en fino de ĉiu monato. Por forigi la tre malkontentigan malhavon de vortaroj, ni komencis eldonadi meze ampleksan ĉeĥa-esperantan vortaron de Hromada kiel aldonon al nia revuo. Aperis jam 64 paĝoj, el kiuj estas videble, ke temas pri verko efektive tre bona, kiu utilos dece al ni. Post ĝia aperigo (ĝi havos 160 paĝojn) ni sammaniere publikigos „Fundamentan vortaron Esperanto-ĉeĥan“, kiu estos tre utila kompletigo al la granda vortaro de Filip, kiu estos jam baldaŭ finfarita en la presejo, kiu ĝin presas por profesia eldonisto. Ni tre ĝojas, ke tiu grava helpilo jam estos je dispono. En redakto de nia organo helpis al la redaktanto Rudolf Hromada kaj Ota Ginz. Tiel estis kreita efektiva redakta rondo, respondanta pri la enhavo kaj ĝenerala aranĝo de la revuo.

Krom la revuo ni eldonis prese:

H. K. Bouška: Esperanto — jednotné jazykové pojítka kaj Krátké uvedení do esperanta, 9-a eldono, 10.000 ekz. — Dr. Tom. Pumpr: Česká a slovenská literatura v esperantu, 1000 ekz. — Kolik je vás, esperantistů? (verkita de R. Hromada), kiun ni eldonis al la 1-a numero de „Esperantista“, 4000 ekz. — Poŝtkarto kun Zamenhofbildo, desegnita de Dolfa Bartošík, 2000 ekz. — Poŝtkarto kun novjara desegno de Dolfa Bartošík, 2000 ekz. — E-leterpapiro kun desegno de D. Bartošík, 5000 ekz. — Presaĵo por respondi korespondadojn kaj mendojn (verkita de Ota Ginz), 2000 ekz. — Malgranda listo de la Libroservo de EAČSR (kompilita de Ota Ginz), 2000 ekz. — Ĉeflingva invitilo al Doksy, 200 ekz.

9. Kontakto kun oficialaj aŭtoritatoj. Pri memorando, prezentita al sinjoro prezidento de la respubliko kaj pri peto pri aŭdienco ni raportis sur paĝo 17 de tiu ĉi jarkolekto. La responda letero denove deklaras, ke sinjoro prezidento havas ĉiam intereson pri nia laboro. Teksto de saluto de sinjoro prezidento al la Berna kongreso, dirita de J. Geryk, estas enpresita sur paĝo 81. Al la Berna kongreso sendis ministerioj de lernejoj kaj de informoj kiel sian delegiton s-on Dolfa Bartošík.

Kun la inform-ministerio ni kontaktis ofte pro la disaŭdigo kaj kiel eldonistoj de la gazeto. Al ministerio por fremdlanda komerco sendis nia grupo el regiona konferenco en Olomouc memorandon. Memorando, prezentita al sinjoro prezidento, estis dissendita al deputitoj kaj al aliaj aŭtoritatoj.

Loka Nacia Komitato en Hradec Králové donis al tiea E. Klubo subvencion da 5000 Kčs por popolklerigaj celoj. Ĉe ĉiuj publikjuraj instancoj, al kiuj ni nin turnadis, ni spertis afablan akcepton kaj komprenon por nia celado. Estu tio dirita tie ĉi kiel publika danko.

10. Kontakto kun nia centra organizo. Ni estas asocio aliĝinta al UEA. Por ĉiu nia membro ni pagas al ĝi po 5 Kčs kiel asocia membro; pro tio li sen plua pago ricevas servokuponaron. Sed ni faras nian eblon, ke ankaŭ nombro de MA kaj MJ estus respektinde granda, kaj ni povas esti kum la akiritaj rezultatoj sufiĉe kontentaj. La administron de enkasigado de kotizoj prenis de ĉesperanto Jar. Šustr la librotenisto. En la statistiko de UEA pri jaro 1947 estos la sama eraro kiel en jaro 1946. Ni sendis al ili finkalkulon en mezo de januaro, ĉar ĉiu Asocio, kiu volas doni numerojn respondajn al la enskriboj, povas tion fari nur finante siajn kalkulojn. Sed UEA havas strangan konvinkon, ke en siajn kalkulojn ĝi povas doni sole membrojn, ricevitaĵn antaŭ la 31-a de decembro. Ni ne trovas tiun ĉi kalkulmanieron taŭga por komparo de rezultatoj ricevitaj en diversaj landoj, kaj ni tre rekomendas al UEA ŝanĝi tiun ĉi procedon. En UEA-komitato reprezentas nin Josef Vondroušek el Brno. En la Berna kongreso ĉeestis el Ĉeĥoslovakio delegitaro 17-membra, gvidita de nia presi-

danto Adolf Malik. Li tie subskribis memorandon de ok naciaj asocioj, pledanta por nia kompreno de demokratio. Ni bedaŭras, ke la diskuto pri ĝi ne respondis al graveco de la problemoj kaj ke niaj vidmanieroj ne estis akceptitaj.

Niaj membroj estas ankaŭ anoj de Sennacieca Asocio Tutmonda aŭ de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Nia organo estas je dispono por iliaj raportoj kaj ni peras enkasigojn de kotizoj por ili.

Ni kunlaboris en varbado de subskriboj por UNO-pet-skribo. Laŭ marta numero de „Esperanto“ ni estas provizore sur kvara loko kun 28.938 subskriboj el 448.566 de la tuta mondo. Sed al tio estos alkalkulita kolektiva subskribo de Sokol.

11. Kontakto kun ceteraj landaj asocioj. Ni sendos tiun ĉi numeron al ĉiuj asocioj laŭ nomaro en la Jarlibro petante ilin legi nian raporton kaj sendi al ni raportojn siajn. Iliaj sciigoj pri la propra agado kaj rimarkoj pri la nia estos por nia plua laborado tre utilaj. — Kun Norvega Ligo ni korespondis pri skriba kurso por instruistoj de ĝi planata. — Kun Bulgara Asocio ni interŝanĝis opinion pri sinteno de UEA al demokratiaj vid-kaj agadmanieroj kaj pri koncerna rezolucio, subskribita en la Berna kongreso de ok asocioj, inter ili ankaŭ de ni, kaj pri la balkana esp. federacio. — Al Itala Federacio ni rifuzis partopreni en polemiko pri kunfandiĝo de IEL kaj UEA. — Britan asocion ni atentigis pri komeniologo angla, kun kiu rilatis prof. J. Hendrich, aŭtoro de artikolo pri Komenský-projekto de artefarita lingvo sendinte al li tiun ĉi artikolon. — Kun Finnlanda Esperanto-Instituto ni interkonsentis subtenon de reciproka interkorespondado de niaj membroj. — Kun Studenta sekcio de la Kroata Esperanto-Ligo ni korespondis pri provo interesigi la Internacian Studentan Union pri E. Rezulto estis, ke IUS ricevas esperantlingvajn leterojn de diverslandaj studentoj. Pri ĝia organo „Studenta mondo“ legu sur paĝo 83.

12. Lernejoj (komisionestro Th. Kilian): Esperanto venkos per la lernejo. La komisiono lerneja konsekvence gvidis sin dum sia tutiara laboro per la devizo: Esperanton en la lernejoj! Mi raportos kiel eble plej koncize, forlasante detalaĵojn kaj korespondadon kun eksterlando, kvankam ĝuste ili postulis multe da laboro kaj tempo.

La unua celo estis la komerca lernejo, kie Esperanto estis antaŭ la okupo en kelkaj lokoj instruata kiel nedeviga fako. La komisiono kaj unu klubo sendis al la ministerio lerneja petskribon, ke ĝi denove permesu la instruadon de Esperanto kiel nedevigan fakon. La demando pri nedevigaj lingvoj instruotaj ĉe komercaj akademioj kaj lernejoj estis pritraktata en Smokovec printempe ĉe la pentekosta tutŝtata kongreso de filologoj ĉe komerca lernejo, kiu per ĉiuj voĉoj decidis, ke Esperanto kune kun 10 aliaj lingvoj estu prezentota al la ministerio kiel nedeviga fako en komerca lernejo. La decidon aprobis ankaŭ la ĉeestanta Studa Komisiono ĉe komerc. lernejo kun sia direktoro, kiu prezidis la kongreson, kondiĉe, ke nia komisiono ellaboros dum unu semajno la necesan instruplanon. Tion ni faris. La komisiono do povis prave esperi, ke Esperanto registros la unuan sukceson. La ministerio akceptis el la 11 proponitaj lingvoj 9 kaj forstrekis 2: Esperanton kaj la latinan. Kial? La komisiono ne scias.

Pli feliĉaj estas ankaŭ nunjare niaj slovakaj samideanoj. Ili instruas Esperanton ĉe komercaj akademioj en Bratislava, Trenčín kaj Turč. Sv. Martin. Ni ĉeĥaj esperantistoj sincere gratulas kaj... envias.

La komisiono preparas en kunlaboro kun parlamenta deputito proponon por la parlamento, ke la registaro proponu pere de sia ministro por eksterlando al registaroj de malgrandaj ŝtatoj la samtempan enkondukon de Esperanto en la lernejojn kiel devigan fakon. Plejan kaj tujan sukceson promesas tiurilate Aŭstrio, Hungario kaj eble ankaŭ Nederlando kaj Pollando. Sed por la komenco sufiĉus triŝtata lingva „Trio“ el ĈSR, Aŭstrio kaj Hungario.

Tiucele la komisiono ellaboris memorandon, kiu estis sendita — presita sur kreta papero kaj lukse bindita — al la prezidento de la respubliko d-ro Edv. Beneš kun samtempa peto pri aŭdienco. La respondon legu sur paĝo 17 de tiu ĉi jarkolekto! La saman memorandon la komisiono dissendis al ĉiuj (305) parlamentaj deputitoj kaj registaranoj.

La proponon faros la deputito al la parlamento en konvena tempo. En kia formo, tio dependos de cirkonstancoj. Pri la plano mi persone parolis kun la prezidanto de l' parlamento s-ro Josef David, kiu kun ĝi kore konsentis kaj promesis, ke li ĝin „centprocente subtenos“. Por certigi al la propono favoran akcepton flanke de la deputitoj, la komisiono klopodis akiri kiom eble plej multe da subskriboj de deputitoj, rezonante, ke ne povos kontraŭstari la proponon deputito, kiu subskribis la „Deklaron“. Ĝis nun subskribis ĝin 23 deputitoj, inter ili gvidantaj personoj de ĉiuj kvar politikaj partioj: s-roj Ant. Zápotočský, Jos. David, d-ro Ad. Procházka kaj Boh. Laušman. La komisiono sukcesis akiri krome kolektivajn subskribon de „Sokol“ kun rimarko: „Pli ol unu miliono da anoj.“ Ni ĉiuj bone konscias, ke nia miliono da sokoloj — fakte Sokol havas proksimume 1,200.000 da anoj — signifas multe pli ol 10—15% de l' tuta ĉeĥa popolo, ĉar pluj 70% de nia popolo estas Sokol-anoj. La komisiono faris paŝojn por ricevi kolektivajn subskribon ankaŭ de nia dua ĝimnastika organizaĵo Orel. Sokol kaj Orel plus iliaj membroj kaj anoj-simpatiantoj, tio estas la tuta ĉeĥa popolo. Nun, kiam ankaŭ Orel eniĝas en Sokol, estas tia aserto ankoraŭ pli trafa.

Tiel — kaj ankaŭ alie — la komisiono klopodis prepari favoran grundon por akcepto de la propono parlamenta, kies celo estas la supre menciita lingva trio, al kiu, konvinkinte pri bona funkciado de Esperanto, nedubeble aliĝus iom post iom la najbaraj ŝtatoj kaj fine la tuta mondo.

Tiun ĉi planon preparolis la komisionestro en Třebíč post kelklettera interŝanĝo kun s-ano R. Čech, estrarano de la Aŭstria Esperantista Federacio, kiu promesis energian kunlaboron.

Mi finas mian raporton. Ĉio estas preparita, necesas „nur“ la impulso, kiu ekruĝigos la Esperantian lavangon. Malhelpis ĝin dum la pasinta jaro ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj kaj zorgoj: katastrofa misrikolto, dujarplano kaj la daŭre malboniĝantaj rilatoj inter Oriento kaj Okcidento. La mondo havas pli gravajn zorgojn ol kia estas Esperanto, ne konsciiĝante, ke ĝuste Esperanto povus fariĝi penicilino kontraŭ mikrobo, kiu kaŭzas la plej pereigan malsanon de l' nuntempo: kontraŭ malfido inter la popoloj.

Lektoraj lecionoj de Esperanto en Alta lernejo por specialaj sciencoj en Praha (lektoro D-ro Aug. Pitlík) kaj en Alta komerca lernejo en Bratislava (lektoro direktoro P. Rosa) daŭras.

13. Propagando ĝenerala. Ekzisto de regulaj kaj ĉiutagaj esperantlingvaj radio-disaŭdigoj estas pro si mem grava fakto propaganda sen diri iun ajn vorton propagandan. Same la tre bona nivelo de la programoj. Krome la disaŭdigoj sur mezaj ondoj el Praha ĝis Londono kaj jaŭdon estas enkondukataj per kelkaj ĉefaj frazoj, klarigantaj la programon kaj celon de disaŭdigoj; ili estas tre valora kaj tre deca propagando en la plej bona senco de la vorto, ĉar oni rekomendas ilon por la paco. La samo validas pri disaŭdigoj el Ostrava kaj precipe pri Hradec Králové, kie estis plurfoje disaŭdigaĵaj ĉeflingve prelegoj pri celoj kaj faktoj de interlingvistika movado. Tie ĉi estu enskribita ankaŭ la rememorigo pri Zamenhof el Radio-Bratislava la 15-an de decembro.

Ni disvastigadis „Pojtko“ de Bouška kun la Elementa kurso. Ni aldonadas ĝin al kajoroj de „Esperantista“, sendata kiel dokumento kaj al aliaj esperantlingvaj presaĵoj. Ĝi estas rapide disvendata.

Ni farigis diapozitivajn (5 desegnajn specojn), kiujn ni senpage pruntas por projekciado en kinejoj. Oni uzis tiun servon jam sufiĉe ofte.

Pri la 60-jara E-ekzisto estis la publiko atentigita per afiŝoj en Praha kaj Brno.

Stacidomaj tabuloj estas denove riceveblaj. Relegu pri tio paĝon 12 de tiu ĉi jarkolekto!

Laŭ ricevitaj informoj okazis dum 1947 publikaj kursoj en sekvaj lokoj: Batov, Boskovice, Brno (4), Hradec Králové (2), Chlumec nad C., Havlíčkův Brod, Karlovy Vary, Klímkovice, Košice (3), Litomyšl, Liberec, Néměčice n. L., Néměčky, Nová Role, Nové Zámky, Olomouc, Ostrava (3), Pacov, Podmokly, Poproč, Plzeň, Praha (5), Šternberk, Tábor (5), Teplice, Třebíč, Turčiansky Sv. Martin, Uničov, Ůpice, Vodňany, Zbiroh, Zlín. Ni enskribis tiujn kursojn, pri kiuj ni ricevis informojn kaj kiuj komenciĝis

en 1947; informon pri nombro de kursanoj ni ricevis ĉe plimulto da ili, kie ni ne ricevis ĝin, ni taksis la nombron. El tiuj ciferoj eliras sumo 1040 en 49 kursoj. Do estis meze en unu kurso 21 partoprenintoj. Ĉiuj kursgvidintoj ricevu dankon pro sia oferemo. Eĉ se ne ĉiu semo donas rikolton, ne perdiĝas ĉiuj.

14. Propagando en fakaj rondoj. Ni reprenis planon de Komerca adresaro kaj nia Klubo en Hradec Králové akceptis taskon ĝin efektiviĝi. En la E. poŝkalendaro 1948 de ĝi eldonita aperis unua listo de ĉeĥoslovakaj komercistoj kapablaj esperantlingve korespondi. La afero bezonas esti persekutata en venonta jaro kaj iniciati analogiajn listojn el ceteraj landoj. La sama klubo ankaŭ klopodas revivigi grupon Esperanto-Komercio por nia lando. — Apero de artikoloj en Ĉeĥoslovenská filatelie de O. Ginz kaj en Filatelistické listy de J. Vondroušek turnis denove atenton de filatelistoj al Esperanto. Same efikas la interŝanĝo de anoncoj inter nia revuo kaj la Ĉs. filatelie. — Por franca abelista ni serĉas korespondantojn en nia lando. — Ni provis interrilatigi nederlandajn sindikatistojn kun la niaj, sed ni devas daŭrigi la klopodojn. — Ni korespondis pri pluraj aferoj komercaj (livero de teksilaj navedoj al Svedio ktp.) sed ni devis rifuzi prizorgon de maŝinparto el Germanio. — Ni proponis al turisma organizo en Veviers disvastigon de esperantaj gvidlibroj pri Belgio. — Ni provis helpi eniron de bulgara studento. — Ni korespondis pri dana E-filmo. — Al Ĉeĥoslovaka filmo-instituto ni donis informon pri esperantaj filmoj kaj literaturo.

15. Prelegvojaĝoj de fremduloj estis organizitaj du: tiu de svedino Ana Alamo kaj de svisoj gesinjoroj A. Baur. Ambaŭ prelegoj estis tre bonaj kaj ilia resonco ĉe la publiko esperantista kaj ne-esperantista estis pli ol kontentiga. Sinjorino Alamo kaj gesinjoroj Baur akceptu dankon pro ilia sindediĉo al tiu afero. Dankon akceptu ankaŭ ĉiuj niaj membroj, kiuj kunlaboris ĉe tiuj gravaj entreprenoj, precipe s-o J. Vitek, kiu akompanis s-inon Alamo ofte kiel tradukanto, kaj s-o A. Slanina, kiu organizis vojaĝon de Baur. Ni provas nun inviti por prelegoj tra la respubliko nederlandan samideanon Valckener; korespondas kun li en nomo de la Asocio s-o Ant. Slanina.

16. Somera Esperanto-Lernejo en Doksy estas entreprenata de aparta komitato de niaj membroj. Ĝia direktoro estas Dr. A. Pitlík, instruistoj en la jaro 1947 s-oj J. Hanuš, A. Slanina, K. Šolc, V. Špúr. Ni raportis pri ĝi sur p. 81. Ĝi estas entrepreno tre signifa pro du kaŭzoj: Ĝi stimulas esperantistojn al pli funda studado de nia lingvo. Ĝi instigas al komenco de studado novajn adeptojn. Ambaŭ celoj estas tre gravaj kaj la Lernejo ilin efektiviĝas kun sukceso tre rimarkinda. Ni denove rekomendas al ĉiuj niaj membroj partopreni en la Lernejo ankaŭ tiun ĉi jaron, ĉu kiel studentoj, ĉu kiel gastoj. Kaj la organizantoj akceptu dankon sinceran. La lerneja komitato eldonas ciklostilitan monatan bulletonon „Verda Voĉo de Doksy“ por esti en daŭra kontakto kun la esperantistoj-vizitintoj de la somerrestadejo. Redaktas ĝin s-o A. Slanina. Sekretario de la Lernejo estas s-o K. Šolc.

17. Gazetara servo. Ĝi devus konsisti en verkado kaj dissendado de pres-pretaj informoj pri interlingvistika problemo. Ĝin ni ankoraŭ ne povis organizi. Sekretario Jar. Mařík kolektis aperintajn artikolojn kaj prezentas pri la rezultato sekvan raporton: Kontrolataj estis gazetoj el Bohemio, Moravio kaj Silezio, ne el Slovakio. Tiu ĉi servo estis bazita sur bonvola helpemo de diverslokaj samideanoj, kiuj sendadis eltranĉaĵojn kun informoj pri Esperanto aŭ al la Centra oficejo aŭ al la adreso de la afergvidanto. Ni konvinkiĝis, ke la asocia kolekto de eltranĉaĵoj tute ne rajtas esti nomata kompleta; ekz. ni ricevis unu aŭ kelkajn eltranĉaĵojn el la gazeto, kiu havas ĉiusemajnan rubrikon pri E. Kelkaj sendaĵoj, direktitaj al la strato Stalinova, ne venis en la manojn de la sekretario. Malgraŭ tio la ĝenerala bildo pri la raportado de la ĉeĥa gazetaro pri Esperanto estas tre kontentiga. La 8-an de marto 1948 nia asocia sliparo de eltranĉaĵoj registris sume 92 gazetojn kaj unu jarlibron, kiuj aperigis en 1947 715 artikolojn, regulajn rubrikojn kun pluraj informoj (la rubriko estas konsiderata kiel unu kompakta informo), memstarajn informojn kaj menciojn pri Esperanto, kaj 31 fotografajojn el la esperantista vivo. Krome tri informoj kongras Occidental. Iuj gazetoj

raportas vere amplekse pri ĉi tiu temo: mi citas nur unu ekzemplon: „Ĉeskoslovenská demokracie“ en Ostrava dediĉis en 1947 sume 1673 liniojn al la esperantistaj aferoj, krom pluraj fotografajoj (laŭ la nekompleta stato de nia sliparo). — La laboro pri la sliparo estas tre temporaba. Ni petas la samideanojn sendadi al ni nur eltranĉaĵojn, ne tutajn gazetojn, kun preciza dato de la apero kaj gazet-titolo. Unufoje dum la jaro bonvolu sendi ankaŭ eltonditan plenan titolon de la gazeto. Dankon al ĉiuj, kiuj oferis monon kaj helpis al ni konsistigi la kolekton — Ni publikigos pli ampleksan artikolon pri „Esperanto en la ĉeĥa gazetaro“.

18. **R a d i o** (komisionestro A. Malík). La disaŭdigoj el Praha I, Ostrava, Hradec Králové daŭras regule laŭ la programoj. Tiu regula dissendado povas esti rigardata kiel la plej granda sukceso de la movado en nia lando. La resono de la disaŭdigoj estas tre bona, venis konfirmoj pri aŭdo el 30 landoj. Dankon akceptu la prelegantojn same kiel la aŭskultantojn, kiuj konfirmas la aŭskulton. Krom la regulaj programoj, kiuj enhavas raportojn pri politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj okazintaĵoj en la respubliko ni enskribu, ke estas regule monate disaŭdigata esperantista kroniko sur mezaj ondoj kaj aparta E. kroniko semajna kvinminuta sur mallongaj ondoj. Aparte ni citu intervjuojn de eksterlandaj samideanoj speciale dum la Junulara mondfestivalo kaj du senperajn raportadojn (el la Foiria palaco kaj el Sankta Ursula-preĝejo dum meso de belga pastro A. Beckers). Kun sincera ĝojo ni salutu revivigon de la Verda stacio la 5-an de januaro 1948 per stacioj Praha II kaj Morava, kiu ĉiun unuan lundon de la monato disaŭdigas artistan programon je la 23,00—23,30 horo. Ankaŭ ĉeĥoslovakoj, aŭskultintaj ĝin, konfirmu tion al stacio Prahál La alta artvaloru de la programoj meritigas la dankojn de ni ĉiuj.

19. **I n f o r m a d o d e f r e m d l a n d o p r i n i a n a c i o k a j ŝ t a t o**. Kvar niaj membroj faris prelegvojaĝojn en fremdlando. Josef Víték tra Danlando kaj Svedlando, prof. J. Filip tra Irlando kaj Nederlando, J. Pelcman tra Pollando kaj Nederlando, Marie Havránková tra Nederlando. Akceptu dankojn la miloj da fremdlandaj samideanoj, aŭskultintaj niajn prelegantojn tiom atente kaj akceptinte ilin tiom komplekse, akceptu la dankon niaj kvar membroj, dediĉintaj sin al tiu ĉi tasko tre grava kaj pacofara. S-oj Víték kaj Filip ricevis de nia Informministerio dekretojn dankantajn pro ilia laboro, pri kiu informis spontanee tieaj konsulejoj la ministerion. La ambaŭ akceptu ankaŭ apartan nian gratulon.

Informado per radio-disaŭdigoj estas fakto jam tro ĝenerale konata por povi pri ĝi longe paroli. Tamen ni citu tie ĉi la ĉefajn radio-parolantojn por danki ilin pro ilia persistemo kaj laboremo: A. Malík, Rud. Hromada, Jar. Mařík, Ant. Slanina, A. Eliášová, J. Valeš, J. Rajm, J. Šustr, V. Král, J. Víték en Praha, Vladimír Slaný, Zdeněk Raška, Stan. Staňura en Ostrava, J. Víték, M. Otčenášková, Vaňa, Pytloun, Patzáková, Štěpánková en Hradec Králové.

La Sokol-kongreso aperigis laŭ nia propono plurajn informilojn kaj invitilojn esperantlingve kaj la tutan serion (12) de ilustritaj poŝtkartoj. Ĝi komisiis nin per ilia distribuo. Ni korespondis kun tre multaj landoj pri la Sokol-kongreso kaj povis liveri al la kongres-komitato diverslingvajn gazetojn kun represo de niaj artikoloj.

Ni dissendis informojn pri Luzacio al diversaj esperantistoj.

Multon faras sur tiu ĉi kampo niaj membroj per unuopa korespondado. Precipe nun estas nia patriota devo informi niajn eksterlandajn amikojn laŭ la vero kaj refuti fantaziaĵojn de malamikoj aŭ de naivuloj.

20. **L i t e r a t u r o** (komisionestro Dr. T. Pumpr). La komisionestro partoprenis la redaktadon de la propaganda broŝuro, kiu poste aperis sub la titolo „Saluton“, kaj la redaktadon de la kolekto de rakontoj de Karel Čapek, kiu estis preparita por la preso. Plue li korektis kaj laŭpete pritaksis ĉirkaŭ 400 paĝojn de manuskriptoj; el tio pli ol duono estis versaĵoj (tradukitaj kaj originalaj poemoj kaj kantoj). — Neniu kunlaboranto anonciĝis por helpi ĉe la tenado de l'sliparo kun la tradukaĵoj el la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj. La komisionestro kondukis plue tiun evidentecon kaj respondadis demandojn pri aperintaj aŭ preparitaj tradukaĵoj. — La komisiono akceptis 42 kaj forsendis 45 leterojn. — Ni klopodis kun sukceso, ke

estu el nia lando deca nombro da abonantoj de „Literatura mondo“.

21. **T r a d u k o j d e l a ĉ e ĥ a l i n g v o** (estrino B. Vlčková). Celu de tiu ĉi komisiono estas starigi, kontroli kaj publikigadi liston de ĉeĥaj verkoj, tradukitaj aŭ tradukataj en Esperanton, por ke tiuj, kiuj intencas traduki, ne elektu la verkon jam tradukitan. Al la listo, aperinta sur paĝo 43, aliĝas:

K. Čapek: Bajky a podpovídky (Jos. Vondroušek).

Ed. Valenta: Ze všech koutů světa (Jos. Vondroušek). Gvidlibro pri Praha estas tradukata de Jan Valeš.

22. **N i a l i b r o s e r v o** (estro Ota Ginz) komencis regule labori en la lastaj kvar monatoj de 1947 transpreninte tiun taskon de Jar. Šustr, kiu ĝin prizorgis fidele dum pluraj jaroj. Por starigi la Libroservon sur firman bazon, daŭras klopodoj por reakiro de oficiala librovendista koncesio, kiu ekzistis ĝis veno de la okupantoj. Nia peto iras tamen tra nekredible multaj instancoj, el kiuj neniu rapidas. Kvankam favora plenumo de nia peto estas tre verŝajna, ni tamen ne estas ĝis nun en posedo de la koncesio. Ni uzis la pasintajn monatojn por restarigi niajn rilatojn kaj ni provis servi nian membraron prizorgante por ĝi el la malgranda ekzistanta E-librostoko tutmonda ĉion haveblan, malnovajn eldonaĵojn, librojn aperintajn dum la milito kaj ni sekvus ĉiujn novajn aperojn. Ni ankaŭ peris abonon al pluraj eksterlandaj E-gazetoj. Niaj klopodoj grandparte sukcesis kaj ŝajne ni bone kontentigis tre multajn interesulojn pri nia literaturo. Ni estis en agrablaj rilatoj kun ĉiuj gravaj E-eldonejoj kaj peris tre konsiderindan spezon. Ni mem eldonis sole du poŝtkartojn (novjaran kaj de Zamenhof), preparitajn de Dolfa Bartošík. Li ankaŭ desegnis por ni novajn leterpapirojn, sed estas en preparo pluraj interesaj libraj eldonaĵoj. La profito de nia Libroservo signifas unu el la tre gravaj fontoj kovrantaj la Asociajn elspezojn. Sen ĝi ni ne povus plani nian agadon en amplekso intencata. Tial ni direktas al ĉiuj, unuopuloj kaj grupoj, denovan insistan alvokon, ke ili ĉesu private komercadi serĉante ne permesitan senperan rilaton kun eldonejoj. La membroj uzu vaste niajn servojn, sed ili bonvolu pacienci dum nuna tempo iom, ĝis la situacio ree normaligis. Plenumo de ĉiuj laboroj estis ebla sole per fortostreĉo eksterordinara de la tri kunlaborantoj: Ota Ginz, Jiří Hromada kaj František Slavík. Amplekso de tiuj laboroj postulas plej urĝe profesian administranton.

23. **E k z a m e n a k o m i s i o n o** (prez. Dr. Stanislav Kamarýt, sekretario Dr. Tomáš Pumpr) alelektis du novajn membrojn (Dr. A. Pitlík kaj T. Kilian), unu membro (J. Friedrich) demetis la funkcion. La komisiono kunsidis dufoje (29. III., 29. IX.) kaj donis 4 diplomojn pri scio kaj 9 pri kapableco instrui. La komisiono preparas liston de ekzamenataj temoj, kiu aperos presita. Akceptitaj leteroj 94, forsenditaj 146.

24. **S c i e n c o** (komisionestro Dr. A. Pitlík). Kun samideano en Anglujo ni korespondis pri Ĉyževskij-libro „Halle-manuskriptoj de verkoj de J. A. Comenius“ kaj prizorgis al li la libron por liaj studoj. — Interesulojn en Katalunio kaj en Urugvajo ni informis pri ĉeĥaj eldonoj de Don Kifot. — Hungaran organizon de teknikuloj ni interrilatigis kun nia fakulo. — Al rozplantisto ni proponis esperantan nomon de nova rozo. — La ano de la komisiono J. Hanuš iniciatis kaj helpis restarigon de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. — Direktoro de la komisiono Dr. A. Pitlík penis pliprofundiĝi inter la ĉeĥaj esperantistoj la scion de Esperanto, ĝiaj gramatikaj problemoj, lingva evoluo, literaturo kaj E-movado, kio estis kaj ankoraŭ estas temo de prelegoj ĉe lektorato de la Alta lernejo por specialaj sciencoj, en la Somera Esperanto-Lernejo en Doksy kaj Esperanta seminario de ÚRO-Laborlernejo en Praha, same la skriba kurso „Kelkaj ĉapitroj pri Esperanto“, publikigataj en Verda Voĉo de Doksy. — La komisionestro proponas, ke estu kreita aparta ĉeĥoslovaka komisiono pri Lingvaj aferoj de Esperanto.

25. **S a k i s t o j** (komisionestro Dr. V. Faigl). En la jaro 1947 mi ricevis 7 novajn adresojn de ŝakistoj-esperantistoj, mi do registris ĝis fino de 1947 sume 28 adresojn. Inter nove registritaj estas kelkaj novaj samideanoj, kiuj eklernis nian lingvon, ĉar ili volas partopreni internaciajn korespondturnirojn de la Esp. fako de ICCA (internacia korespondŝaka asocio). Niaj samideanoj ludas en ĉiuj 13

grupoj de la korespondturniro de la Esp. fako de ICCA. Ludataj estas du interŝtataj luktoj, unu kun Nederlando (komenciĝis en 1946) kaj dua kun Svedio (en 1947). Ambaŭ estas ludataj sur 10 ŝaktabuloj. En la unua lukto gvidas nia teamo per 3½:1½, en la dua per 2:0. Ĉeĥoslovaka teamo nepre partoprenos la turniron de landaj teamoj, projektatan de la Esp. fako de ICCA. La kontakto kun Ŭstřední jednota ĉs. ŝachistů estas daŭre tre bona, ĉar la komisionestro estas estrarano de ŬJĈŠ.

26. Skoltoj (komisionestro St. Lešinger). En pli ol cent lokoj en Bohemio kaj Moravi-silezio estas perantoj-skoltoj, kun kiuj la komisionestro kontaktas per cirkuleroj; dum la jaro estis dissenditaj 5 cirkuleroj en suma nombro de ĉirkaŭ 1000 ekz. al skoltaj esperanto-grupoj. La samideanoj, konantaj skoltojn-esperantistojn, estas pe-tataj sciigi iliajn adresojn al la komisionestro. Skolta korespondado kun fremdlando vikle disvolviĝas; fratulo Bühr disponigas por ni sian Interŝanĝan adresaron kaj publikigas en ĝi senpage adresojn de fremdlandaj skoltoj. Leteroj akceptitaj 182, forsenditaj 121.

27. Ekspozician materialon ni ankoraŭ ne posedas en sufiĉa kvanto, kvankam ni tre bezonus ĝin, ĉar ekspozicioj, precipe en monraj fenestroj magazenaĵ, estas relative ofte aranĝataj de niaj aktivaj membroj kaj lokaj grupoj. Ĉe diversaj niaj komitatanoj jam kolektiĝis diversaj taŭgaj objektoj. Estus bezone, ke iu el niaj membroj proponu sin al laboro, kiun antaŭ milito dum vico da jaroj faradis s-o E. Beran, meritanta esprimon de danko ankoraŭ nun. Temus pri kolekto kaj ordigo de tia materialo kaj sendi ĝin laŭ petoj venantaj. Ĝi estus tasko tre utila kaj povus ĝin plenumi samideano, loĝanta ekster la ĉefurbo, kiu trovas intereson kaj plaĉon en tia konservado kaj administrado. Tia laboro tute ne estas enuiga. Ankaŭ bezona estus por tio iu ŝranko por konservi la objektojn kaj ujo por sendadi la aĵojn en ĝi. — Kun tiu ĉi servo povus esti kunigita ankaŭ *Asocia albumo*, kolektanta fotografiojn pri nia laboro kaj pri niaj laborantoj. Ŝajnas al ni taŭga okazo inviti en tiu ĉi raporto komplezajn membrojn esplori, ĉu iu el ili povus anonci sin por tiu ĉi grava servo.

FINANCOJ 1947

Aktivoj		Pasivoj	
	Kĉs		Kĉs
1. Kaso	333.60	6. Ŝustr, Praha	14.645.—
2. Poŝta ŝparkaso	10.646.90	9. IEL - Váňa	15.498.—
3. Bankoj	119.863.90	10. IEL 1947	4.205.—
4. Bonhavo:		11. UEA 1948	16.100.50
a) Libroservo	4.267.70	12. Libroservo	3.715.—
b) Radiokomisiono	1.914.70	13. Radiokomisiono	6.244.70
c) Kongreso Bern	1.662.80	14. Ekzamena komis.	2.847.60
d) Diversaj	1.500.—	15. Diversaj	8.869.60
5. Inventaro	7.648.—	16. Kotizoj 1948	14.462.—
6. Mono blokita	14.509.90	17. Oficeja rezervo	24.000.—
7. Transira aktivo	2.301.—	18. Transira pasivo	17.299.50
			127.886.90
		Havaĵo fina	36.761.60
			164.648.50
	164.648.50		164.648.50

Detaloj:

1. Kaso administrata de s-ino Nováková. — 2. Konto n-ro 9.602. — 3. Spořitelna pražská 110.704.70, Spořitelna Doksy 5.159.20, deponlibro de Pošta Sparkaso Praha 4.000. — 4a) Bonhavo ĉe Libroservo por la vortara aldono al n-ro 8. — 4b) Kontanta mono ĉe la komisiona kasisto Mařík 714.70, ricevota honorario de Radio 300.—, ricevotaj 10% 900.—. — 4c) Duoble pagitaj kongreskotizoj, ricevota el Bern. — 4d) Antaŭpago de gazet-afranko 1000.—, diferenco en Olomouc 500.—. — 5. Skribmaŝino post 15% amortizo 5.950.—, skribmaŝino (adaptota) 1.698.—. — 7. Kotizoj 1947 pagitaj en januaro kaj februaro 1948. — 8. IEL-kotizoj venintaj al nia konto dum la administrado de s-o Ŝustr Kĉs 12.145.—, niaj kotizoj al IEL por 150 asociaj membroj 1946 Kĉs 750.— kaj por 350 membroj 1947 Kĉs 1.750.—. — 9. Slovakaj kotizoj senditaj al ni por IEL. — 10. Nia kotizo por asociaj IEL-membroj 1947 laŭ la jena kalkulo: La nombro de niaj membroj je la 31. XII. 1947 1.497, inter ili rektaj membroj de IEL (MA, MJ, MS) 306. La kotizon po 5 Kĉs ni do pagas por 1.191 membroj, t. e. la sumo 5.955.—, minus la supre cititaj 1750.—, restas la sumo de la pasivoj Kĉs 4.205.—. — 11. UEA: Ĝis la 31. XII. 1947 ni enkasigis por UEA 1948: 112 MA po 125.— Kĉs 14.000.—; 26 MJ po 50.— Kĉs 1.300.—; 7 MA po 100.— (partopago) Kĉs 700.—; aliaj partopagoj Kĉs 100.50; sume Kĉs 16.100.50. — 12. Mono veninta por nia Libroservo al konto 9.602 dum decembro. — 13. Radio-komisiono: Komenca havaĵo Kĉs 3.453.40, enspezoj 1947: 3.640.—, elspezoj (afranko) 848.70, havaĵo fina 6.244.70. — 14. Ekzamena komisiono: Komenca havaĵo Kĉs 1.992.—, enspezoj 1947: 2.412.—, elspezoj (afranko-vojaĝo- kaj ejo-kostoj): 1.556.40, fina havaĵo Kĉs 2.847.60. — 15. Diversaj: 29 personaj kontoj kun mono disponota de niaj membroj. — 16. Kotizoj por 1948 pagitaj jam en 1947. — 17. Rezervo fondita por kovri la unuajn elspe-

zojn de nia estonta Oficejo. — 18. Elspezoj faritaj en 1948, sed koncernantaj la jaron 1947.

Spezoj

(Perdo - gajno - konto)

1. Kvoto al IEL	5.955.—	10. Kotizoj, abonoj	113.063.—
2. Gazeto	67.255.30	11. Anoncoj	3.500.—
3. Propagando	4.936.40	12. Donacoj	4.740.90
4. Afranko	8.262.10	13. Diversa	795.70
5. Presaĵoj	5.214.60	14. Diversa 1946	2.410.30
6. Vojaĝoj	700.—		
7. Diversa	910.20		
8. Amortizo	1.350.—		
9. Oficeja rezervo	24.000.—		
Rezulto	5.926.30		
	124.509.90		124.509.90

Detaloj:

1. Vidu: pasivoj 10. — 2. Preso, klišoj, banderoloj kaj kovertoj, ekspedo-kostoj kaj ekspedo-afranko de 10 numeroj kun 120 paĝoj plus titolpaĝo kun enhavo-tabelo, entute 124 paĝoj. — 3. Preso kaj dissendo de memorando pri Esperanto en lernejoj, propagando ĉe Wilson-stacidomo. — 4. Afranko por forsenditaj leteroj, kartoj kaj presaĵoj, 257.20 donacitaj de regiona peranto s-o Frant. Blaha, Zlín. — 5. Aliĝiloj, membrokartoj, membroslipoj, statutoj, leterpapiroj, poŝtkartoj, kovertoj, pagiloj de poŝta ŝparkaso. — 6. Vojaĝo de Malik al Brno, de Milek al Praha. — 7. Telegramoj, fisko-markoj okaze de fondo de novaj grupoj, bank-kostoj. — 8. Amortizo de la du skribmaŝinoj. — 9. Vidu Pasivojn 17. — 10. Kotizoj kaj abonoj: Por 1947 pagis ĝis la fino de februaro 1948: 709 rektaj membroj po 70 Kĉs; 800 grupaj membroj po 55 Kĉs; 116 studentaj membroj po 30 kaj 40 Kĉs; 48 familiaj membroj po 20 Kĉs; 112 aliaj; entute 1.785 membroj. Abonoj en ĈSR 174. Membroj kaj abonantoj 1.959. Abonoj en eksterlando 21. Entute 1.980. — Membroj kaj abonantoj loĝas en 568 lokoj de Ĉeĥoslovakio. Inter ili estas 70 lokoj, kie ni havas ne membrojn, sed sole abonantojn. — La lokoj, kie troviĝas almenaŭ dek membroj (plus nuraj abonantoj, en parentezoj): Praha 322 (10)

Brno	120 (7)	Mladá Boleslav	21 (4)
Hradec Králové	70 (2)	Prostějov	20
Olomouc	50 (2)	Uherské Hradiště	19
Tábor	44 (1)	Ŭstí nad Labem	19
Ostrava	43 (9)	Ĉeská Lipa	16 (1)
Liberec	39 (1)	Pardubice	15 (3)
Doksy	36	Ĉeské Budějovice	13 (1)
Zlín	33	Jablonec a Paseky	13
Karlovy Vary	30	Podmokly	11 (3)
Plzeň	26 (7)	Havlíčkův Brod	11
Cheb	25 (1)	Litoměřice	10 (1)
Turnov	22	Vodňany	10

Po 8 membroj: Bojkovice, Písek, Třebíč. — Po 7 membroj: Hluk u Uh. Brodu, Kladno, Přerov. — Po 6 membroj: Bařov, Červený Kostelec, Kolín, Ústí n. O. — Po 5 membroj: Beroun, Bratislava (plus 4 abonoj), Holešov, Chrudim, Litomyšl. — Po 4 membroj: Dolní Bousov (plus 1 abono), Sokolov (plus 1). — Novaĵ kluboj, kies ciferoj

aperos en 1948: Brno-Židenice, Břeclav, Darkov, Chomutov, Jaroměř, Josefov, Kraslice, Teplice-Šanov, Trutnov. — 12. Donacoj: E. K. Hradec Králové 500.—, Ing. Kochman, Praha 200.—, la resto rezultas el tio, ke multaj membroj pagas pli ol estas la kotizo. — 13. Procentaĵo por banke deponita mono. — 14. Aldonaj profitoj de la jaro 1946, ekz. anonco Doksy.

LINGVO

16. úkol k překladu.

Jan Masaryk v rozhlasě 31. prosince 1944: Teď k vám mluví váš zahraniční ministr, nejen Jan Masaryk. Naše zahraniční politika v roce 1945 bude záležet na pevném, nezměnitelném a mohutném základě naší smlouvy se Sovětským svazem. Vše, co z této naší základny vyplývá, budeme plnit stoprocentně, bez váhání a nekompromisně. Někdy se o nás mluví, jistě velmi bona fide, jako o mostu mezi východem a západem, a dokonce jsem byl neinformovanými lidmi označen já za propagátora této technické formule. My jsme se nikdy nikomu za most nenabízeli a nenabízíme. Slavný Sovětský svaz a velké západní demo-

kracie nás jako mostu nepotřebují. Po mostě se chodí a to nám zrovna nekonvenuje. — Naše styky se sousedy ostatními budou pod zorným úhlem naší sovětské smlouvy. Chceme demokratické, silné Polsko, ale jen takové, které bude spolupracovat se Sovětským svazem. Na jiné řešení polské otázky nemáme ani času ani chuti. Chceme slušné demokratické Maďarsko, které nám jednou provždy dá pokoj, ale zase jen Maďarsko, spolupracující se Sovětským svazem. Totéž platí o Jugoslávii, Rakousku a Rumunsku. Náš poměr k západním Spojencům se nezmění a nezmění.

Překlady nám raĉte zaslati do 25. dubna! — Nejlepší odměnime knížkou.

NI LEGIS

Forigí supersignitajn literojn proponis per cirkulero presita sinjoro John Kubacki. Li proponis anstataŭi ĝ kaj ĵ per ĵ, ĉ per q, ŭ per w, ŝ per x, ĵ per y. Lia argumentado vidigas mankon de ĉiu ajn sperto en uzo de lingvoj kaj surprizigan nescion pri fonetiko de Esperanto kaj pri ĝia etimologio. Konata esperantisto Olafur S. Magnússon dissendas al Lingvokomitatoj cirkuleron multobligitan, kiu pledas por sekva anstataŭo de supersignitaj literoj: ĉ per ch, ĝ per q, ĥ per x, ĵ per y, ĵ per j, ŝ per sh, ŭ per w. Li timas same kiel Kubacki, ke iu komitato de Unuigitaj Nacioj, kiam ĝi decidus pri enkonduko de lingvo internacia, povus rifuzi Esperanton pro supersignitaj literoj. Sinteno de ambaŭ proponantoj al la ĝisnunaj spertoj de esperantistoj estas same stranga. Ili pensas, ke enkonduko de tiom grava ŝanĝo dependas de decido de la Lingva Komitato Esperantista. Tiu opinio kontraŭas tre ege la teorion same kiom la spertojn. La L. K. ne enkondukas reformojn, ĝi konstatas ilin kaj ĝi studas kaj kritikis la nove aperantajn fenomenojn lingvaj. La sole irebla vojo enkonduki neologismojn estas komenci kun ilia uzo. La praktiko montros, ĉu ili estas bezonaj, taŭgaj, plaĉaj, ĉu ili eniĝos en la lingvon aŭ ne. Plurfoje oni jam provis presi tekstojn sen supersignoj. Zamenhofa permeso uzi h anstataŭ la supersigno estis ne unufoje uzita, sed ĉiam oni revenis al la klasika ortografio kun supersignitaj literoj. Oni kompostas Esperanto-tekstojn sur ne unu linotipo same kiel oni povas presi sur linotipo ĉefan kaj multajn aliajn lingvojn kun supersignoj.

Esperanta Finnlando, oficiala organo de Esperanto-Instituto de Finnlando. Administracio: Eldono Vilho Setälä. Redaktoro Magistro Vilho Setälä. Adreso: Onnentie 23 Helsinki - Kä, Finnlando. Komencis aperi en februaro 1948. Monate, presita po 8 paĝoj 16×24 cm, en la finna kaj Esperanto. Ni salutas la novan gazeton, ĉar ĝi dokumentas, ke nia movado denove starigas en Finnlando, kie ĝi inter la du militoj iam tre floris. Ni legas tie, ke en la popollernejo de Kullaa estas E. instruata devige al 12 lernantoj, 1 leciono posemajne. Estus utile scii, ĉu la lernejo estas publika aŭ privata.

Pri la dua postmilita pola kongreso esperantista en Warszawa la 4—5-an de oktobro 1947 raportas Pola esperantisto el januaro-februaro 1948, aperinta nur nun. Ĝi aperas multobligita, 10 paĝoj, esperant- kaj pollingve. La kongreson partoprenis 150 personoj. Ĝi estis sub protekto de ĉefministro Józef Cyrankiewicz, kaj ĉeestis oficiala deligito de la ministerio por klerigo vicministro W. Garnarczyk. La kongreso akceptis rezolucion pri enkonduko de E. en lernejojn kaj sendis ĝin al ministerio de klerigo kaj de eksterlandaj aferoj, Profesio-unuiĝo de pola

instruistaro, ĉiuj politikaj partioj, Centra komitato de sindikatoj laboristaj ktp. La nova estraro de la Asocio de esperantistoj en Pollando estas: Prezidanto Jan Zawada, ĝenerala sekretario Isaj Dratwer, kasisto Edward Bugajski. Adreso: Warszawa, Marszałkowska 81 m 32.

La ĉeĥa-esperantan konversacion de J. Šupichová recenzas svedlingva gazeto „Freden“ n-o 1/1948 en Stokholmo kun rekomendo por la svedaj esperantistoj prizorgi al si la libron kiel helpilon por sia eventuala vojaĝo al Ĉeĥoslovakio. (jm)

Budapeŝta foiro aperigis tre belajn afiŝojn kaj tre impetajn flugfoliojn varbajn esperantlingvaj. La foiro estos la 11—21-an de junio 1948, la dato estis prokrastita por grandaj solenoj, rememorigantaj liberecbatalojn de hungaroj en 1848. Adreso de la Foiro: Budapest VI, Bajcsy Zsilinsky-út 26.

Esperanto kaj radio. Demandu viajn amikojn, kiuj dum la okupado aŭskultis la „BBC“ kaj aŭskultis ĝin en flandra, en franca, en angla aŭ eĉ en germana lingvo por esti certaj, ke ili ne maltrafus iun novaĵon, ĉu ili ankoraŭ aŭskultas ĝin? Kial ili aŭskultas per mallongaj ondoj, malfacile, tiujn samajn novaĵojn, kiujn ili povas aŭskulti tute facile kaj regule el la nacia dissendilo? Eble kelkaj fantaziuloj aŭ kelkaj specialistoj, kiuj bezonas tute specialajn novaĵojn, ankoraŭ tion faras. Sed mi ne timas aserti, ke la nombro de la regulaj aŭskultantoj ne estas granda. — Kion alportas Esperanto al la radio-stacioj? (Ĝi alportas kernon de regulaj aŭskultantoj, kiuj jam pro sia esperantemo interesiĝas pri eksterlando, kaj profitas ĉium okazon praktike uzi la lingvon, parolante ĝin kiam eble kaj ankaŭ aŭskultante ĝin kiel eble plej ofte. Se jam por ni, kiuj havas okazon ofte paroli nian lingvon, estas ĝuo aŭskulti esperantajn radio-dissendojn, por iu esperantisto loĝanta eksterurbe, kun tre malmultaj eblecoj interilati kun samideanoj, tiuj dissendoj estas unika okazo enpenetri en nian lingvon kaj konvinkiĝi pri ĝia internacia valoro, aŭskultante sinsekve paroladojn el plej diversaj landoj. (Bulteno de Reĝa Belga Ligo Esper., februaro 1948.)

Kiuj deziras reprezenti la »Esperanto Film-Grupon« en sia lando, bonvolu sin anonci grandnombre el ĉiuj landoj. Antwerpsestraat 45, Bergen op Zoom. (Nederlando).

NOVAJ LIBROJ

En la jaro 1947-a mi, trafoliumante nian Esperanto-gazetaron, trovis jenajn novajn librojn — kiuj estu daŭrige de mia ĉiujara nomaro, certe ne kompleta:

Nacilingvaj tradukoj:

El la angla: Booth Frank (tradukis?): Arboj de la arbaro kaj kampo, 40 paĝoj; H. T. Hamblin (F. W. Hipsley): Povo sukcesi, 28 p.; Shakespeare W. (Stephan A. Andrew): Antonio kaj Kleopatro, 96 p.; Wiseman (E. Ramo): Fabiola, II-a eldono. **El la finna:** J. H. Errko (V. Setälä): Spegulo homarana por koroj maljunaj kaj junaj. **El la franca:** L. M. Grignon de Montfort (M. Wigberus van Zon): La mistero de Maria, 64 paĝoj. **El la germana:** J. C. Heer (A. Bader): Ĉe la sanktaj akvoj, 84 p.; Th. Storm kaj M. Escherich: Du amosentaj noveloj, 44 p.; Diversaj aŭtoroj (E. Pebe): Tri majstronoveloj, 32 p. **El la holanda:** P. van Dorp (M. Monulfus): Biblio aŭ Instru-aŭtoritato, 87 p.; T. Thijssen (F. Faulhaber): La nevenkebla ĝeno, 319 paĝoj. **El la portugala:** Augusteno de Silva (Manuel de Freitas): Vivo de Zola; la sama aŭtoro: Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo (trad. J. J. Rodrigues); la sama aŭtoro: Vivo kaj arto de Goya (trad. Vergili Mendes). **El la sveda:** Tage Lindborm (Martin Johansson): Sveda laborista movado (92 paĝoj).

Originalaj verkoj:

Poemoj: Lucien Thevenin: La vana kanto (64 p.).
Prozo: J. Degekamp: Esperanto 60-jara (60 p.); Marika Dragona: La reala vivo de nia Sinjoro kaj Savinto Jesuo Kristo (123 p.); Stellan Engholm:

Vivo vokas (180 p.); András Fáj: Elektitaj fabeloj; Gunnar Furhammar: La homo, kiun milionoj aŭskultas (112 p.); A. Mildwurf: Leĝa terminaro (10 paĝoj); La konkursintoj: Premiaj romanetoj (95 p.).

Tradukoj de diversaj aŭtoroj:

Esperanta krestomatia (120 p.); P. Neergaard kaj P. Thorsen: Eta krestomatia (48 p.); Novaj Esperanto-historietoj (72 p.); Kvara rapsodio (48 p.; red. F. Szilágyi).

Lerniloj:

L. Kökény: Populara lernolibro de Esperanto (64 p.); P. Korte: Sub la verda standardo; Alois Norbert: Senhalte al la celo (52 p.).

Adresaroj:

H. Steiner: Tutmonda adresaro (130 p.); F. A. Postnikov: Kiu estas kiu inter nordamerikaj esperantistoj, II-a eldono.

Verkoj de ĉefaj esperantistoj:

Esperantista poŝkalendario 1948 (88 p.). J. Šupichová: Uĉebnice pro samouky a kursy, 5-a eldono (125 p.), la sama aŭtorino: Hovořime esperantsky — Esperanta konversacio, II-a eldono (132 p.). L. Kolářová (trad. Dr. T. Pumpr): Saluton.

Verkoj de slovakaj esperantistoj:

J. V. Dolinský: Okienko do sveta (64 p.); E. V. Tvarožek: Esperanto v 14 úlohách (28 p., multoblig.). 21. I. 1948. J. Šupichová.

Tiu ĉi listo ne estas listo de vendotaĵoj. Pri tiuj informas sole Informoj de nia Libroservo.

KRONIKO ENLANDA

La petskribo al UNO. La kampanjo estos finita en printempaj monatoj. En januaro 1948 estis la sumo de subskriboj 448.566, la grandan suprensalton kaŭzis kontribuo el Germanio, kie subskribis kolektive Bavara sindikato laborula, loka grupo en München, kun 127.630 subskriboj. Ĉeĥoslovakio estas sur kvara loko kun 28.938 subskriboj. Laŭ »Esperanto« el marto estos nun pli ol miliono, kun Norvegujo ĉe la supro. Sed al nombro el Ĉeĥoslovakio aliĝos la kolektiva subskribo de Sokol, akirita de s-o Kilian. Kie estas ankoraŭ subskribitaj formuloj, sendu ilin aŭ al ni aŭ senpere al UEA en Heronsgate. Klopodu en la lasta momento varbi pluajn subskribojn!

Prepara komitato de Sokol-kongreso aperigis serion (12 pecoj) de ilustritaj poŝtkartoj kun koloraj bildoj kaj esperantlingvaj tekstoj »Ĉeĥoslovaka respubliko. XI Sokolkongreso en Praha junio-julio 1948«. Ni dissendas tiujn kartojn al niaj membroj petante, ke ili ne konservu la kartojn por kolekto aŭ dokumentado sed uzu ilin por sendi al siaj eksterlandaj amikoj. Tio estas unu el la plej bonaj metodoj propagandi nian landon kaj nacion kaj la Sokol-ideon. Ricepe en nuna momento estas nacia devo de ni ĉiuj montri al fremdlando, kiom regule kaj ordigite iras daŭre nia publika kaj privata vivoj. Kiu povas kaj volas tiel uzi tiujn tre uzeblajn poŝtkartojn, skribu al ni, li ricevos ilin poŝtrevene kaj ni esperas, ke li volonte rekompencos la malgrandajn elspezojn.

Radio-komedio »Fantomo en la kastelo«, verkita de Miloš Šrámek, tradukita de T. Pumpr, estis disaŭdigata de la Verda Stacio la 1-an de marto je la 23,00 per stacioj Praha II, Morava

kaj České Budějovice. La komedio daŭris 30 minutojn kaj estis efektive ridiĝa. La aktorantoj meritas ĉiun laŭdon pro tre bona elparolado kaj komprenebleco. Sed ricepe ni enskribu tie ĉi nomojn de la du ĉefrolantoj: Roberto prezentata de s-ro Höger kaj Katarina parolata de s-ino Švábiková. Robert sukcesis pleje, kiam li sidiĝis inter la gastoj; la koloro de lia voĉo sugestis la surprizon kaj timon de la ceteraj tiomgrade, ke malfacile oni povus tion fari pli impresive. La fantomo Katarina sciis efektiviĝi la komikaĵojn de sia rolo kaj kunigi ilin kun virina ĉarmeco. Mi dirus, ke plej bone estis diritaj sekvaj dialogeroj ŝiaj: »Bedaŭrinde!« »Pro bagatelo,« »Li sciis,« »Ĉu vi scias kisi?«, »panjo!« La veran arton oni trovas en detaloj. Reĝisoris J. Bezdiček. Sekvonta programo estos lundon, la 5-an de aprilo. Aŭskultu, vi ne bedaŭros!

Prospekton pri urbo Trenčín, belan broŝureton 20-paĝan, 9,5×9,5 cm, riĉe ilustritan per bildoj pri pejzaĝoj kaj pri folkloro, slovak-lingvan kun unu paĝo esperantlingva (»Ĉu vi konas Trenčín?«) eldonis Slovako, loka grupo por vojaĝtrafiko en Trenčín. Kiu petos, ricevos ĝin senpage poŝtrevene de la eldoninto. La urbo kaj lia ĉirkaŭaĵo estas tre allogaj.

Velmi doporučujeme našim členům, aby se přihlásili za členy Československé společnosti pro mezinárodní styky, jež je Československým sdružením pro Spojené národy. Jednou z posledních výzev Jana Masaryka byla výzva k těmto přihláškám.
Adresa: Praha I, Valentinská ulice 1.

LOKAJ INFORMOJ

Ni petas niajn aktivulojn, ke ili nin regule informadu pri ĉio okazanta en ilia loko, kio havas ian rilaton al nia movado. Ni preparas laŭ tiu materialo niajn Lokajn informojn, kies kolekto volas fariĝi konciza historio de la E-movado en nia ŝtato. Ĝi volas al ni rememorigi faktojn kaj personojn, kiuj influis la antaŭeniron de Esperanto en la diversaj regionoj, instrui nin pri la ĝustaj vojoj kaj manieroj kaj averti nin antaŭ laboro probable senfrukta.

Lokaj informoj parolas pri aferoj okazintaj, neniam pri planoj (kiuj iam ne efektiviĝas), ĝi citas nomojn (kun antaŭnomoj!), sed evitas laŭdojn kaj honorigojn. Ilin diru iam la historio.

Pri kurso ĉiam sciigu la nomojn de la aranĝinto kaj de la instruisto, nombron de la partoprenantoj, daton de la komenco kaj fino, laŭeble la ejon, kie oni instruas, kaj ĉiam la metodon (lernolibron), laŭ kiu oni instruas. Similajn indikojn ni petas pri paroladoj.

Komprenu, ke Lokaj informoj devas esti plej koncizaj kaj koncedu al ni ilian aranĝon! Legu alineon pri via loko, por ke vi ne sendu al ni sciigon pri la entrepreno jam enskribita duan aŭ trian fojon.

Bežovce. — Kurso por studentoj de burĝa lernejo (13 ĝis 15-jaraj) gvidata de direktoro Lud. Tomkovský. (E. S.)

Bruo. — Koncerto de Nuni Nanev, akompanata de Petra Nanev kun piano-solludoj (unutetoj) de komponisto Vilibald Scheiber, estis aranĝita de E. K. en la speĝulĉambro de hotelo Passage la 24-an de februaro kun jena programo: Caccini: Amarillia (itale); Pergolese: Nina (esperante); Händel: Largo (esperante); Mozart: Viroj penas... (esperante); Schubert: La amo mensogis (esperante); Ave Maria (esperante); Chopin: Polonaise A dur — V. Scheiber; Čajkovský: Sám a sám (ruse); Smetana: Nekamenujte proroky (ĉeĥe); Chopin: Fantasie-Improptu Cis moll — V. Scheiber; Massenet: Manon (esperante); Rimski-Korsakov: Sadko (esperante); Smetana: Jak možno věřit... (ĉeĥe). Chopin: a) Kiam matene, b) Melankolio, c) For de l' okuloj, d) Mesaganto, e) Primavera (esperante); V. Scheiber: Polko C dur — V. Scheiber; bulgaraj popolkantoj: Gergana (bulgare), ŝano (bulgare); ĉeĥaj popolkantoj: Teče voda, Dobrú noc. La vespero estis tre eminenta artisma ĝuo. Konkurencon por Nanev oni povas trovi nur inter la plej famaj tenoroj. Same ni fieras pro virtuoza arto de s-ano Vilibald Scheiber, direktanto de orkestroj kaj komponisto, kies verkoj venkas en muzikaj konkursoj kaj kiun entuziasme admiris la tuta publiko. Ĉeestis 120 personoj, inter ili s-anoj el Plzeň kaj Hradec Králové. (J. Vondroušek)

Bystřice pod Hostýnem — vere maldormiĝis kaj intencas baldaŭ stari inter aliaj lokoj, kie Esperanto bone progresas. La 17-an de februaro 1948 komencis esperanta kurso por skolta ĝejunularo (24 knabinoj, 11 knaboj). Kurson aranĝis kaj gvidas fervora kaj tre lerta esperantistino s-ino Valja Flašarová, edzino de kuracisto.

České Budějovice. — S-ino A. Alamo venis en la urbon la 24. VI. 1947. Akceptis ŝin en la stacidomo prezidanto de la Klubo Fr. Vacek kaj prof. J. Vurm kun pluraj samideanoj. Sekvis ekskurso al la kastelo Hluboká. Vesperon okazis en Beseda prelegoj de Alamo (tradukata de prof. Vurm) kaj de J. Vitek pri Svedlando. — Ekspozicion de esperantaĵoj aranĝis la Klubo Progreso la 7—10-an de sept. en la astronomia observatorio. — Kurso komencita en septembro havis 32 p., gvidis ĝin K. Hofhansel. — Zamenhof-vespero okazis la 17-an de decembro 1947; prelegis prof. J. Vurm. — Nova kurso komencis en januaro 1948, gvidas ĝin prof. inĝ. L. Krajič, 20 partoprenantoj. — Ekspozicio de esperantaĵoj estis instalita en januaro en montra fenestro de Urba oficejo por fremdultrafiko. — La Klubo Progreso kunvenas ĉiun mardon en la hotelo Slunce. Ĝia adreso estas: E-Infom-Servo, Šumavská 250.

Doksy. — Nova kurso komencis la 4-an de februaro. Aliĝis 37 p. Instruas V. Špūr. La klubo komencis eldonadi ĉeflingvan ciklostilitan bultenon, aperantan laŭbezone kaj sendatan senpage al la klubaj membroj. La unua numero (2 paĝoj) aperis la 1-an de februaro.

Hradec Králové. — Ĝenerala kunveno de la E. K. la 22-an de febr. 1948 elektis jenan komitaton: Prezidanto: Jos. Vitek, faka instruisto; la vicprezidanto: Stanislav

Váňa, medicin-studento; Ila vicprezidanto: Fr. Tuch, poŝta supera sekretario; la sekretario: Fr. Pytloun, ofic. de ŝt. fervojo; Ila sekretario: Milan Novák, studento; la kasisto por sekretariaj aferoj: Jos. Sobišek, insp. de ŝt. ferv.; Ila kasisto por monaferoj: V. Knoulich, tajlora entrepreno; revizoroj: E. Beran, insp. en pens., M. Goldmanová, ofic. de urba oficejo; komitatanoj: J. Tobiášek, E. Beran, V. Dytrtová, L. Lemanová VI. Dušek; redaktoroj de klubaj gazeto: direktoro Jar. Dolanský, insp. Jiří Otčenášek; amuza komitato: VI. Forman, Fryč, VI. Dušek, M. Pytlounová, Jar. Bryndová, M. Štěpánková; radio-disaŭdigo: M. Otčenášková, J. Otčenášek, Hromas, Paťzaková, Štěpánková; gazetinformo: Václav Dušek, insp. de ŝt. fervojoj; matrikulo: M. Slezáková. La ĝenerala kunveno ĉiesvoĉe elektis profesoron Miloš Lukáš honora membro. — La klubo abonas jenajn gazetojn: Afrika revuo, Amerika esperantisto, Argentina esperantisto, Esperantista, Esperanto, Heroldo de E., Internacia kulturo, Laborista esperantisto, La folio, La juna vivo, Literatura mondo, Nederlanda katoliko, Sennaciulo, Esperantisto slova, Studenta fronto, Svenska Esperanto-Tidningen. Listo imitinda!

Cheb. — Ĉi-aŭtune komencis Patera kaj Bystřický sian poresperantan laboron en tiu loko. Jen rezulto, raportita okaze de la unua ĝen. kunv. de la ĵus fondita loka grupo de EAČSR: 24.—30. IX. ekspozicio en montra fenestro de bone lokita magazeno, 12. X. publika kunveno kun 14 p., 5. XI. malfermita E-kurso kun 15 p. por policianoj, 12. XI. publika parolado pri E., 26. XI. komenco de nova kurso kun 32 p., instruas F. Patera. Regiona gazetaro regule informis, krome publikigis kelkajn favorajn artikolojn pri nia lingvo. La grupo posedas nun jam daŭran ekspozicion en montra fenestro en ĉefa strato kaj baldaŭ havos propran klubejon. Ĝen. kunvenon partoprenis 32 membroj. Estis elektitaj: prez. direktoro Pára, sekret. Bystřický, aliaj komitatanoj: Ošťádalová, Kovařík, Dvořák kaj Jansa. Tiel fariĝis la loka grupo Cheb la plej forta en la sesa regiono. Adreso: Esperanto-klubo, Cheb 2, poŝtkesto 2. (Pa)

Chodov. — Kurso komenciĝis en novembro 1947, gvidata de s-o David, staciestro.

Chomutov. — Loka grupo de EAČSR finis la unuan kaj komencis tuj novan kurson. Krome speciala kurso por studentoj en loka Industria lernejo, gvidata de Mucha. La grupo aranĝis efikan ekspozicion varban en du montraj fenestroj en la plej vivaj stratoj. La fondintoj de la E-movado en tiu regiono Fr. Gruntorád, Rud. Tůma kaj Ranec ricevis honorajn insignojn de la klubo en Plzeň. Regulaj kunvenoj en restoracio Zlatý kříž ĉiumerkrede je la 17-a horo. Adreso de la sekretario: Rud. Tůma, Chomutov, Škroupova 28.

Košice. — Teo-vespero la 22. XI. 1947, artsoleno la 14. XII. 1947 (Zamenhof-festo). La kurso 16. X.—11. XII. finiĝis kun 9 p. (E. S.)

Liberec. — Raporto pri la agado de la Klubo en 1947: La klubo havas propran ejon en Pražská strato 3, kie ĝi semajne kunvenas. Propagandaj ekspozicioj estis en hotelo Imperial la 18-an de majo, kaj unumonata dum majo en strato 5. května. La klubo starigis registron kaj kolekton de gazet-eltranĉaĵoj kun mencioj pri Esperanto. Estis fondita albumo por konservi fotografiajn de laborantoj kaj de okazintaĵoj. Vizitintoj el fremdlando estis Anna Alamo el Svedlando, Dr. A. Baur kun edzino el Svislando, francino Marcelle Poyet, Verdonk el Nederlando, J. Dittrich el Jugoslavio, polino V. A. Prelegoj de Alamo kaj de Baur havis tre bonan sukceson. Propagandaj prelegoj ekster la urbo estis en Jeřáb, Ruprechtice, Chrástava; prelegis Inĝ. Fanta, St. Blecha, dir. Madr, T. Novotný. Ekskursoj estis aranĝitaj al Tanvald-Souš, Turnov—Hrubá Skála, Hradec Králové, Pardubice—Kunětická Hora, Ústí n. L., Praha (3foje), Česká Lípa (ekspozicio), Doksy („Nokto en Karlův Týn“). Aŭtuna kurso, gvidita de s-o Inĝ. Fanta, finiĝis kun 20 frekventintoj. En la tagjurnalo Stráž severu estas regula semajna rubriko pri Esperanto, gvidata de s-o Inĝ. Fanta; ĝi estas tre zorge redaktata kaj estas fiero de la esperantistoj el la VIII-a regiono. Por publika leĝejo estas abonataj Herol-

do, Internacia kulturo, Literatura mondo. En fino de la jaro la klubo sukcesis starigi propran domon, kie estos oficejo de la VIII-a regiono, legejo, biblioteko, klubo. — Nova kurso por komencantoj de 17. II. 1948 en klubo, Zadní strato n-ro 1. (T. Novotný)

Náchod. — 29. I. parolis prof. P. Jan Filip en Sokoldomo pri Nederlando kaj projekciis filmon. Partoprenis ĉiuj klasoj de la gimnazio kaj la profesoraro. La parolanto dediĉis gravan parton de la parolado al nia afero kaj finis per esperantlingvaj frazoj. La sekvo estas serioza intereso pri Esperanto.

Nová Role. — Nova kurso por lernantoj de ceramika fabriko gvidata de MUDr. Frant. Vaněk.

Nové Mesto nad Váhom. — Kurso la 6. X.—25. XI. 15 p., gvidata de M. Seppová kaj M. Hlinková. (E. S.)

Ostrava. — Kurso en Slezská Ostrava en nov.-dec. 1947 kun 30 p. Instruis Chaloupka, prez. de la E-Rondeto de Slezská Ostrava.

Ostrava-Zábřeh. — E. Societo Komenský havis sian II-an ĝen. kunvenon 8. II., dum kiuj estis elektitaj: prez. Alois Kubala, Zábřeh, Rodinná 43, unua vicprez. Theodor Targosz, Zábřeh, Beskydská 25, dua vicprez. Jindřich Jakeš, Zábřeh, Rodinná 21, sekretario Fr. Bražina, Vitkovice, Zengrova 49, kasisto Karel Petřík, Hrabůvka, Letecká 14, administranto Fr. Eliáš, Zábřeh, Chalupníkova 8, prezid. de amuza sekcio Alois Schindler, Zábřeh, Zengrova 125, estro de la kantista sekcio Ad. Martinkevič, Zábřeh, V poli 36, estro de la muzika sekcio Frant. Basl, Zábřeh, Chalupníkova 14. Aliaj komitatanoj: Jos. Weiss, Hrabůvka, Místecká 158, Anna Hrbáčová, Zábřeh, Rodinná 41, Valerie Jerábková, Zábřeh, Březinova 87. Gvidanto de la junularo Lad. Kyselý, Hrabůvka, Provaznická 10. La vigle laboranta societo havas 40 aktivajn membrojn kaj 115 amikojn de Esperanto. — Daŭras jenaj kursoj: por skoltoj kaj junuloj kun 18 p., gvidas Hojdys, por maturaj personoj kun 20 p. gvidas Al. Kubala, en burĝa lernejo komenciĝis la 28-an de januaro kun 44 p., gvidas Al. Kubala. Propaganda parolado de Al. Kubala en burĝa lernejo 14. I. al 49 lernantoj.

Praha. — Junulara sekcio de E. Klubo estas reorganizata kiel sekcio Teatro-Amatora, kaj ĝi kunlaboros en la Verda stacio. — Filatelista unuiĝo (Sdružení filatelistů) en Libeň decidis en sia jarkunveno la 29. II. 1948 fondi esperantlingvan fakon, gvidatan de s-o Rudolf Brádrler. En Libeň aranĝis L. Kynčl kaj R. Brádrler ekspozicion de esperantaĵoj (gazetoj, libroj, presajoj, korespondaĵoj, fotografajoj). Estis tie malfermita konkurso traduka por junularo. En kinejoj en Libeň estas prezentataj propagandaj diapozitivaj. S-o L. Kynčl komencis duan kurson por progresintoj kun 20 p.

Podmokly. — La 30. XI. vizitis ĉi tiean klubon 15 membroj de E-klubo Ústí. La kunvenon ĉeestis krome 13 p. el Podmokly, 1 el Benešov, 1 el Česká Kamenice. Jaroslav Dušek raportis pri la samtaga kunveno de regionaj perantoj en Praha.

Prešov. — Kurso en dua ŝtata gimnazio por 56 studentoj, gvidata de admin. direktoro K. Lukáč. (E. S.)

Příbor. — Regulaj kunvenoj vendrede je la 19-a horo en knaba burĝa lernejo. Kurson por lernantinoj en kadro de lernantina organizo gvidas instruisto de burĝa lernejo Ant. Satték. Pasintjare gvidis la sama mallongan (unumonatan po 2 horoj semajne) kurson en Fundamenta faka lernejo por virinoj. Apud la stacidomo varba kesteto. Pri nia lingvo atentigas ankaŭ mura tabulo, kiu alvokas la preterveturantojn en E. kaj en ĉeĥa lingvo: Veturu atente! Jezděte pozorně! Lokaj esperantistoj prizorgas unu el la benketoj parkaj; sur ĝia apogilo estas la surskribo: Klub esperantistů v Příboře. En kuracistaj atendejoj, en stacidomo kaj en pluraj vendejoj estas afiŝetoj kun varbaj frazoj por E.

Staré Splavy. — S-o Vlastimil Severa finis sian kurson. Al la kursfina festo venis 12 membroj de la klubo el Doksy.

Tábor adiaŭas sian prezidanton. — Inĝeniero Krajíc forlasis sian amatan klubon kaj forveturas en sian novan deĵorejon en České Budějovice. Maloĉte sukcesas Esperanto-instruisto tiom kiom nia estinta prezidanto. Preskaŭ ĉiuj membroj de la klubo estas liaj lernintoj kaj kiam da ili estas jam mem sukcesaj instruantoj! Ekzemple en Pacov estas nova fervora klubo, kies prezidanto s-o

Papež lernis ĉe li. Same en Borotín funkcias kurso, kies gvidanto s-o Vyčichl vizitis kurson ĉe li. Samĉe s-o Knotek, kiu instruas Esperanton en la burĝa lernejo en Tábor. Same en Votice komencis kurson en la industria lernejo faka instruisto s-o Liška, kiu estas disĉiplo de inĝ. Krajíc. Liaj lernantinoj JUC. Komzákova kaj sekretariino de la komerca akademio s-ino Koutníková instruas nian lingvon al skoltinoj. Liaj lernantoj s-oj Zumn, Zeman kaj Kubka finis tri kursojn en la gimnazio, eĉ mem profesoro inĝeniero Shánělec, kiu transprenis nun la Esperanto-instruadon en komerca akademio, frekventis perfektigan kurson ĉe sia antaŭulo. — Inĝ. Krajíc ĉeestis multajn universalajn kongresojn kaj de tie li alportis al si profundan konvinkon pri granda valoro de nia laboro kaj nobla misio de nia afero. Tial li sukcesas gajni kaj per sia bonega instrua metodo tenis la intereson de siaj disĉiploj. Li ĉiam ion montras: instruante pri domo li montras ludilan domon, parolante pri pupo, li montras pupon ktp., sed neniam forgesas kunpreni ian Esperantaĵon. La kursanoj amuziĝas. Estas lia eco ĉiam rideti kaj tiu feliĉa agordo de lia animstato sugestas fidon al homoj ĉirkaŭ li. La dankemaj klubanoj de Tábor deziras al sia estinta prezidanto, ke li estu ankaŭ pluen sana, kontenta kaj feliĉa. Ni envias al Ĉ. Budějovice kaj deziras al s-o Krajíc, ke li ankaŭ tie rikoltu la samajn sukcesojn kiel en Tábor. (Prof. Dr. Hugo Jokl.)

Tábor. — Gimnazianoj brave laboras: Studenta aŭtonomio de la gimnazio en Roosevelt-placo aranĝos por siaj membroj kurson de Esperanto. Oktavano Dobroslav Zeman disaŭdigis per la lerneja radio alvokon al studentoj de la instituto, ke ili partoprenu kurson de Esperanto. Li estas kompleza instrui tiun ĉi lingvon, kiu al ni donas eblon ekirilati kun la fremdlando. Ni bezonas en la mondo amikojn. Estas eble Esperanton ellerni facile kaj en la Esperanto-klubo povas poste ĉiu ludfacile perfektigi ĝis plena rutino vorte kaj skribe, ĉar en nia klubo oni parolas senescepte esperante. La kunvenoj estas ĉiumarde de la 19—21-a horo en la Esperanta klubejo en hotelo Znamenáček. Gastoj estas ĉiam bonvenaj! Alvenu, kaj Vi vidos, ke al Vi plaĉos ĉe ni. Post tiu ĉi mallonga alvoko, en ĉiuj klasoj bone aŭdebla, ĉar ĝi estis parolata, kiam estis jam la profesoroj malantaŭ la katedroj, anoncis sin tuj 83 partoprenantoj. Tial instruos krom D. Zeman ankoraŭ la oktavano Jozefo Vyčichl kaj krome gvidos unu klason membro de la klubo imposta oficisto s-o Knotek, kiu jam tre sukcese instruas Esperanton en la burĝa lernejo. (Dro Hugo Jokl.)

Tepliče-Šanov. — Kunvenoj de E-klubo ĉiun mardon en kafejo „Na vyhlídce“, angula domo Leninova-Krupská, je la 20-a horo.

Třebíč. — La grupo havas jam 30 membrojn. — S-o Theodor Kilian kolektis kaj forsendis al UEA 5.063 subskribitajn deklarojn por petskribo al UNO personajn kaj kolektivajn deklaron de Sokol. En Třebíč subskribis la deklaron proksimume 18% da loĝantaro. Se ni kalkulas nur la plenaĝulojn do ĉirkaŭ 35%.

Turč. Sv. Martin. — E. estas instruata al ĉirkaŭ 300 lernantoj de la lokaj lernejoj (11—18-jaraj). (E. S.)

Ústí nad Labem. — Nikolaa vespero 13. XII. kun ĉirkaŭ 100 p. Alveturis samideanoj ankaŭ el malproksima ĉirkaŭaĵo. La 17. XII. solena kursfina festo. El la 30 aliĝintoj de la unua nunvintra kurso, gvidita de Miloš Hlaváček, restis ĝis la fino 15 p. Ili ricevis atestojn. Muzika trio de Ústí, el kiu du estas klubaj membroj, ludis malnovajn kaj modernajn komponaĵojn.

Valašské Meziříčí. — Kurso, gvidata de Rudolf Kvita, komenciĝis la 18-an de novembro 1947.

Zlín. — La 18. XII. en Societa domo festa vespero por la frekventintoj de la lingvaj kursoj, aranĝitaj de ŬRO. Plej grandan sukceson havis la lernintoj de la E-kurso, gvidita de Fr. Bláha. La publiko entuziasme akklamis ilin, kiam ili prezentis naciajn kantojn en esperanta traduko kaj lertan esperantlingvan konversacion. Partoprenis J. Zeman, aŭtoro de E-lecionoj en ĵurnalo Ĉin, la unua postmilita E-kurso, aperinta en gazeto. Laŭ lia instigo estas preparata fondo de loka klubo.

Zvolen. — Kurso por 20 gimnazianoj gvidata de prof. J. Mamojka. (E. S.)

Žilina. — Privata kurso por 15 ĝelernantoj de V. Rajčok. (E. S.)

RICEVITAJ LIBROJ

Versaĵoj de Joe. Elektitaj el la Sukro-eldonaĵoj 1935—1946. Entute ducent ekzempleroj. Presejeto „Sukro“, 2, Cambridge Street, Willoughby, N. S. W., Aŭstralio. 56 pĝ. 10×16 cm. Multobl. Prezo ne montrita. Poemaĵoj de tre diversa enhavo kaj valoro, grupigitaj en ok ĉapitroj: La unua ĉapitro enhavas kelkajn pecojn de la jam tro gurdita temo laŭ la modelo: „Brilu, brilu, Verda stelo!“. Sekvas ĉapitroj kun versoj amuzaj, pesimismaj, religiaj, ĝeneralaj. La du lastaj estas pri amo kaj iom liriko al Narcisa. Atentinda estas la dua ĉapitro Esperantigoj. Ne pro sia kvalito, sed ĉar la tradukinto simple mencias, ke temas pri traduko el la angla, germana, ĉina, japana, sed la veran aŭtoron li ne nomas. La leganto divenu, ke la originalon de la versaĵo „Supre, ĉirkaŭe, silento...“ skribis J. W. Goethe, k. t. p.

La formo ne estas eksterordinara. Genas tro oftaj adasismoj (atingiĝus — plenumiĝus), la postmeto de la artikolo post la epiteto (verda la standardo), la kunmeto de epiteto kun la substantivo (bonkoro, Bondio). Se la transitiva vorto substantiviga, ne povas la rekta objekto resti en akuzativo. Tial oni ne povas aprobi la formojn kiel: Post sepoĵa rompo nian leĝon (korekte: de nia leĝo). Sed krom ĉi tiu strangaĵo la lingvo estas bona.

Laŭ la formo kaj enhavo estas plej ŝatindaj la vere belaj lastaj lirikaĵoj Al Narcisa, nome la poemoj: Amata de mi... kaj Aŭskultu! Kelkaj sentencoj pri la senmanka interbatalado de la homaro bone trafas la kernon de l'problemo. El la tuta multo ni citos du ne tro longajn poemetojn. La unua estas epigramo tradukita el nenomita angla aŭtoro, la alia estas unu el la pesimismaj originalaĵoj:

Al mi, ho! kia granda plaĉo,
se falus ĉiu dento via
el tiu klaĉa buŝegaĉo,
krom unu... Tiu ne por maĉo,
sed dentdolor' purgatoria.

*

Sur blua maro ŝipeto vojaĝas...
Bom! Bom! La submara, traŭfante, fornaĝas.
Fariĝis vidvino ies edzino.

La aŭtoro ŝajne ne serĉas por siaj verkoj aĉetantojn, sed dissendas ilin al siaj amikoj tra la mondo. —tp—

Esperanta Krestomatio. Kompilita de H. A. de Hoog, Mr. A. J. Kalma, W. H. Kruit, Frato Wigbertus van Zoon. Eld. Nederlanda Komitato Esperantista. 120 pĝ 13×18 cm kart. Prezo Hfl 1.75. Por 36 Kĉs afr. liveras nia librovendejo. — La kompilitoj sciis trovi en niaj elstaraj libroj (unualoke en Fundamenta Krestomatio) kaj en bonaj verkoj aliaj tekstojn prozajn kaj poemojn, plejparte tre taŭgajn por perfektigemuloj. En Nederlando oni rekomendas la verkon al kandidatoj por la elementa E-ekzameno kaj por simila celo ĝi bone servos ankaŭ en landoj aliaj. Oni adaptis la tekstojn — iam tre kuraĝe — por bezono de nespertaj legantoj, kiujn eble povus ŝoki la originalaj formoj, ne tute konformaj al la nuna uzo. Ne pri ĉiu adapto oni povas konsenti, sed por la menciita celo la verko prezentas tre utilan helpilon. (O. G.)

Agostinho da Silva, La prahistoria arto. Trad. José de Freitas Martins. — La budhismo. La samaj aŭtoro kaj tradukinto. — Kajero 4-a kaj 5-a de la „Enkonduko en la kulturon“, eld. de Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa, 49-1, Porto. Ĉiu kajero 24 pĝ 13×17 cm. Prezo po 7 Kĉs de nia librovendejo. Kompletaj serio de 6 kajeroj 34 Kĉs. — Tiu ĉi serio unika de sia speco popularigas sciencon de plej diversaj fakoj. Ag. da Silva estas klera aŭtoro, kiu sur bazo de citataj fontoj prezentas traktatojn utilegajn por refreŝigo de antaŭaj scioj aŭ por akiro de scioj novaj. La iam aperantaj lingvajn eraretojn (estas malmulte da ili en la nunaj du kajeroj) ni pardonu, kontraŭmetante la utilon, kiun tiu senpretenda kolekto alportas. — „La prahistoria arto“ parolas pri la neoftaj ekzemploj, kie la antaŭhistoria homo kreis bildojn aŭ statuojn. La temo postulas bildojn kaj ili en granda nombro akompanas la tekston. „La budhismo“ klarigas la devenon kaj esencon de tiu religio, kiun hodiaŭ post 2500 jaroj konfesas proksimume 400 milionoj da homoj. (O. G.)

Sub la verda standardo. Esperanto-instruo al infanoj laŭ la rekta metodo. Elementa kurso de P. Korte, estro de lernejo por unuagrada daŭriga instruado en Veendam. Esperanto-eldonejo: J. Muusses (Purmerend) Nederlando. 25×15 cm. — Konsistas el 4 kajeroj presitaj laŭlonge, titolitaj: Laborilo (unua volumo), 40 paĝoj, Laborilo (dua volumo), 60 paĝoj, Memorigilo, 48 paĝoj, Gvidilo, 96 paĝoj. La laboriloj havas multajn bildojn por doni al lernantoj eblecon ekparoli aktive. Enestas demandoj, postulantaj respondojn laŭ decido de la studentoj. „Memorigilo“ estas destinita por ke la studentoj akiru bezonan vortprovizon. La vortoj ne staras tie unuope, sed kiom plej eble en paroj aŭ en rilato kun aliaj. „Pro tio la enmemorigado ne estas tiel stulta kaj aŭtomata. La instruisto povos skribigi la nacian tradukon malantaŭ la esperanta teksto.“ La „Gvidilo“ estas detala konsilario por instruanto. La aŭtoro instruas Esperanton al siaj ĝelernantoj laŭ propra metodo. Li prezentas ĝin en tiuj ĉi tre bele presitaj kajeroj, kiuj meritas tre atentan studon de ĉiu instruanto kaj instruonto. La nederlandaj esperantistoj akceptu gratulon pro ebleco aperigi helpilojn tiom zorge faritajn kaj presitajn.

J. M. Šerý: Doba a život. Verŝe pro kaŝdeho. Vydal Jindřich Bačkovský v Praze. 76 str. 15×22 cm. Cena 35 Kĉs. — Sbirka sličných českých básní z dob válečných i poválečných, apostrofujících USA, Velkou Britanii, SSSR, Čínu a Francii, a opěvujících staré sochy, klavíry a mlhy v ulicích, lásku, mílenky, oceány, dálky, ostrovy a exoty, UNRRU, podzimy a 12 ročních měsíců. Básně, z nichž na čtenáře dýchne radost ze života a tichá důvěra ve věci budoucí. Opravdu verše pro každého, verše plné poesiel (KP.)



El la administracio: Pro nával látky, souvisící s naším sjezdem, musili jsme odložit kromě jiného též překlad 15. textu a slovníkovou přílohu omezení na 16 stran.

Z technických důvodů přikládáme ji všem členům. Ony členy, kteří si slovník nepředplatili, prosíme o malou samideánskou laskavost: Vraťte nám dosud vyšlé slovníkové archy, potřebujeme je pro jiné.

Náklad prvních archů slovníku je rozebrán. Pokud nestačí výtisky vrácené, dáme archy tisknout znovu, takže všichni noví členové dostanou slovník samozřejmě celý. Neurgujte tedy, máme v patrnosti.

El la redakcio: En tiu ĉi jarkolekto ni publikigas eminentajn Lukáš-tradukaĵojn de ĉiuj tri gloraj Zamenhof-poemoj. Ĉar sufiĉe ofte okazas esperantistaj programoj kun ĉeĥlingvaj tekstoj, ni pensas, ke deklamoj de tiuj poemoj en ĉeĥa lingvo povas esti tre efika.

Juvelisto el Jablonec n. N., kiu korespondis kun s-ro Mentser el Detroit, bonvolu tuj skribi al oficejo de EAĈSR.

Právě vyšel

Velký slovník esperantsko-český

od prof. J. FILIPA a K. FILIPA

446 stran, v plátně vázaný

Za 209 Kĉs expeduje doporučeně ihned
po dojití této částky na účet psp. 12.371

Knihkupectví Svazu esperantistů ČSR

INFORMOJ DE NIA LIBROVENDEJO

- Ni havas nun ian provizon de kelkaj malnovaj eldonajoj kaj povas tuj liveri:
- Vortoj de Zamenhof. 76 pĝ 12×18 cm Kĉs 15.—
 J. S. Machar, Benedek. Trad. R. Fridrich. " 10.—
 24 pĝ 14×20 cm " 15.—
 St. Schulhof, Bohemaj grenatoj. Tradukoj el ĉeĥa poezio. 32 pĝ 12×16 cm " 10.—
 Dr. St. Schulhof, Aŭtunaj floroj. Orig. poemoj. 30 pĝ 12×16 cm " 5.—
 Kalocsay, Mondo kaj koro. Poemoj. 32 pĝ 11×15 cm " 40.—
 H. K. Bouška, Ŝkola esperanta. Uĉebnice, rozmluvy, ĉitanka pro začátečníky i pokročilé. 160 pĝ 15×22 cm " 22.—
 A. Novák, Ĉeĥa literaturo laŭ birdperspektivo. Trad. Kroužil. 58 pĝ 15×23 cm " 6.—
 W. Reymont, En fumejo de opio. Trad. Kabe. 16 pĝ 11×19 cm " 25.—
 Fr. Hebbel, Gyges kaj lia ringo. Trad. P. Benemann. 152 pĝ 12×18 cm bind. " 25.—
 A. Moebusz, Dokumentoj de Esperanto. Informilo pri la historio kaj organizo de la E-a movado. 200 pĝ 12×18 cm " 15.—
 Privat, Kursa lernolibro. 78 pĝ 11×16 cm " 4.—
 Kolektoj de malnovaj gazetoj: (Daŭriĝo de tiu listo sekvos.) " 20.—
 Gestudentaj intereso. 3 nroj el 1911 " 20.—
 Interligilo de P. T. T. nroj 28, 29, 101, 120 ĝis 128, 134, 136—139, 141, 144, 152, 153, 156 ĝis 158, 162—170, 173—5 " 10.—
 Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista nroj 40, 41, 43, 45—49, 51, 52, 55, 56 " 6.—
 Scienca Gazeto. Eldonis Amerika E-Instituto, nroj 41, 43 " 10.—
 La Kosmo, Tokio, nroj 4—6 " 10.—
 La Praktiko nroj 7, 28, 33, 53, 77 " 12.—
 Bulgara Esperantisto, XVI—1, 2, XVIII—1, 2, 7, 8, XVIII—5, 6, XIX—2, 3, 6—10, XX—1—7 " 10.—
 Danubo, Bucuresti II/1911 1—7 " 6.—
 Nun tuj liveribla: " 75.—
 J. Ŝupichová, Kdo je L. L. Zamenhof. 36 pĝ 12×18 cm " 75.—
 Nove alvenis (recenzo sekvos): " 75.—
 Lajos Zilahy, Printempo de morto. Trad. Lad. Somlai-Spierrer. Eldonis Eldona Soc. Esperanto, Stockholm. 122 pĝ 13×20 cm " 75.—
 Al la supraj prezoj ni aldonas la efektivan afrankon.

Se vi ne havas ankoraŭ
JUBILEAN KALENDARON 1948
 mendu ĝin tuj por 30 Kĉs ĉe EAĈSR

Devo de ĉiu serioza esperantisto estas
 aboni la reprezentan revuon

LITERATURA MONDO

Kolekto de plej valoraj literaturaĵoj,
 aperantaj en nia lingvo.
 Kunlaboras niaj unuaj poetoj kaj verkistoj.
 Sendu tuj vian abonpagon Kĉs 150.—
 al Librovendejo de EAĈSR
 (pŝp kto nro 12.371).

ESPERANTO V CIZINĚ

Dopisování školní mládeže se školami v zahraničí organizuje Učitelská federace v Austrálii. Při dopisování se užívá vedle angličtiny a francouzštiny také esperanta. Zájemci z Československa, hlavně z řad učitelstva, využijte této příležitosti a napište na adresu: W. Chandler, 57 Northcote St., Crow's Nest, N. S. W., Austrálie. Udejte počet dětí, jejich věk a druh školy. Nejrozšířenější australské noviny přinesly již zprávu o tomto meziškolním dopisování, jež končí slovy: Je škoda, že my, dospělí, se tak zdráháme následovat příkladu dětí. W. Chandler žádá esperantisty v Československu, aby zaslali dopisnici na adresu The President N. S. W. Teacher's Federation, 166 Phillip St., Sydney, N. S. W., Austrálie a vyslovili mu své potěšení, že založil klub, který toto meziškolní dopisování organizuje. Podpořte tím snahu australských esperantistů, kteří chtějí dokázat všem pochybovačům, že myšlenka esperanta je stále živá a aktuální. O tomto podnětu píše též článek »Meziškolní dopisování« v Kulturní službě z 15. XI. 1947. (T. Henek, Drásov)

III. letní škola esperanta V DOKSECH U MACHOVA JEZERA 17.—31. července 1948.

III. zpráva:

L. Š. E. v Doksech uspořádá ve dnech 17.—31. VII. t. r. tyto kursy a společenské podniky:

1. A) Kurs základní (če-metodou pro začátečníky); B) pokračovací (č. m.); C) konverzační; D) esperantský seminář pro znalé esperanta, činovníky a ty, kdož hodlají esperantu vyučovat. Účastníci kursů a semináře obdrží po písemné zkoušce (testu) vysvědčení o účasti a prospěchu. Vyučování ve všech odděleních od 8.30—12.30 hod. Kursy C) a D) současně připraví ke zkoušce — a) ze znalosti esperanta, b) ze způsobilosti k jeho vyučování — před zkušební komisí Svazu esperantistů ČSR, jež bude zasedat v sobotu odpoledne 31. VII. v Doksech. (Příslušné informace vyžádejte si u Svazu! Zkušební taxy zkoušek: za nižší 50 Kĉs, vyšší 200 Kĉs.)

2. Odpoledne: Koupání v jezeře, závody plavecké a veslařské, společné besedy a zpěv, výlety do okolí. — Večer: Zábavné podniky a tanec. — Celodenní autokarový výlet 25. VII. do Českého ráje (hrad Kost, Prachovské skály, Trosky, Hrubá Skála, lázně Sedmihorky).

3. Školné za kurs neb seminář (48 hod.), opravňující též k návštěvě zábav, podniků, 350 Kĉs. Ubytování v soukromí obstará „škola“. Poplatek za 14denní pobyt 400 Kĉs. — Hotelový pokoj zamluví si každý sám písemně a včas v některém z těchto hotelů: Grand, Bellevue, Sparta, Sysel, Sport, Nádraží.

4. Počet účastníků omezen. Přihlášky (nejpozději do konce června t. r.) a dotazy (přiložte známku na odpověď!) přijímá jednatel Karel Šolc, Mladá Boleslav I, 41; školné a poplatek za ubytování zasílajte poštovní složenkou č. 66.421 spořitelně v Doksech s poznámkou „Letní škola esperanta“. Přihláška bez současného zaslání peněz nepokládá se za přihlášku. Čtete též zprávu I. a II. v minulých číslech! Další informace v příštích číslech.

KOMITÉT „LETNÍ ŠKOLY ESPERANTA“ V DOKSECH